



PACO



OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

N-o. 21-22. ĈEĤOSLOVAKA ELDONO Aŭg. - sept. 1955

NIVENKASĈIUJNBAROJN

Ankoraŭ ne pasis tro longa tempo kaj "MEM" povas jam esti fiera pri la atingitaj sukcesoj. Dum longaj jaroj la neŭtrala esperantista movado ne sukcesis enpenetri la larĝajn popolamasojn en tia masŝtabo kiel "MEM" dum sia mallongtempa ekzisto. Unu el niaj plej gravaj sukcesoj estas, ke la tuta estraro de la Monda Packonsilantaro aprobas nian agadon kaj en tiu senco ĝi ankaŭ, invitis nin sendi sian delegitaron al la monda Progreso de pacdemandantoj okazigita en Helsinki. Tiun ĉi kongreson ĉeestis 2. 000 delegitoj el 90 landoj kaj unu el la plej vizititaj kunvenoj (kultura) ricevis rajton paroli Esp-lingve nia delegito, k-do Knut Hangström el Stokholmo. Oni uzis 6 oficialajn lingvojn, la rusan, germanan, ĉinan, hispanan, francan kaj anglan. Nia delegito parolis esperante kaj lia parolado estis tradukita. Okazis aparta konferenco de delegitoj, kiuj regis Esperanton kaj postkongresa pakekspozicio aranĝita de niaj gek-doj en urbo Turku. Sekve do la atingitaj sukcesoj monmontriĝos baldaŭ la rezultoj.

Ankaŭ ni estis invititaj al la Mondfestivalo de Junularo okazinta en Varsovio. La Festivalkomitato servigis specialan tradukiston por servi al esperantistaj interesuloj kaj disponigis al tiuj belan kunvenejon en la centro de Varsovio.

En ambaŭ tiuj grandaj kongresoj partoprenis niaj gek-doj el diversaj landoj kaj bonege plenumis siajn taskojn. Ni forte kredu kaj klopodu, ke la estontaj kongresoj estu por ni ankoraŭ pli sukcesaj kaj fine forigu la lingvajn barojn per uzado de unu sola internacia lingvo, Esperanto.

"MEM" ankaŭ havas eminentan meriton pro la renaskiĝo de la Esperanto-movado en la popol-demokrataj ŝtatoj kaj Sovjetio.

La politikaj gvidantoj de tiuj ŝtatoj ne aprobis Esperanton, kiel ĝin uzis la neŭtrala movado, por celoj kosmopolitaj, aŭ nura distraĵo de unuopuloj. Sed uzi Esperanton por ĝeneralaj tuthomaraj celoj, por sekurigi kaj defendi la mondpacon, ili ne povas nei. Surfundamente de persista kaj aktiva agado de niaj popoldemokrataj gek-doj ni unue sukcesis starigi sur la ruinoj de la iama mem likvidiĝinta neŭtrala movado en Ĉeĥoslovakio nun jam fortan esperantistan pacmovadon kun pli ol 2. 000 aktivaj anoj kaj grupoj en pli ol cent urboj. Ili ja parte ankoraŭ ne ĝuas plenan legalecon, sed ĉiuj ŝancoj por ĝi jam nun montriĝas kaj dependos nur de ilia plua aktiveco kaj persisto.

Ĉeĥoslovakio eldonas propran Esp-bulnenon sub titolo "La Pacdefendanto", kiu estas legata de pli ol 4. 000 gek-doj en ĉiuj lokoj de la lando kaj en multaj landoj de la cetera mondo.

La ekzemplo de Ĉeĥoslovakio kaj la instigado de "MEM" fine sukcesis veki nian movadon ankaŭ en la aliaj Popoldemokratioj, kie jam antaŭ kelka tempo kolektiĝis grupoj al aktiva kunlaboro. Refunkcias la Asocio de Esperantistoj en Polio kaj la Bulgara Esp-Asocio kun Esperanto-Kooperativo en Sofio. Ambaŭ tiuj asocioj jam eldonas siajn landajn organojn por kolekti kaj aktivigi ĉiujn esperantistojn sub la devizo "Per Esperanto por la mondpacon!" En Hungario, Rumanio kaj Germanio-DDR lastatempe niaj persistaj gek-doj atingis bonajn rezultojn per ilia laboro: En D. D. R. k-do, L. Schödl estis dum landa kongreso de pacdefendantoj en Dresden

elektita ano de Centra Packonsilantaro. K-do, Rösner en Ölsnitz ricevis rajton paroli en uzina radio antaŭ 6. 000 gelaboristoj pri Hiroŝima kaj Nagasaki laŭ Esp-broŝuroj el Japanio. En radio-stacion Budapest estis invitita, laŭ instigo de nia finnlanda k-do. N. Kavenins, k-do P. Balkanyi por raporti en formo de intervjuo pri siaj spertoj per Esperanto en la pacmovado, kiujn li akiris per sia vasta internacia korespondado. En landa kunveno, kiun ankaŭ partoprenis J. Baghy kaj Kaloczay, gek-doj el diversaj lokoj de Hungo decidis pliaktivigi sian agadon por fine starigi leĝe aprobitan esperantistan pacmovadon ankaŭ en Hungario.

Mankas ankoraŭ aktivigi niajn gek-dojn de Ĉinio kaj Albanio. Sed tio jam ne tiom gravas, ili venos tamen, malgraŭ la lastaj, por envicigi sin en la grandan fronton de esperantistaj pacbatalantoj, kiu jam nur sin etendas trans la tuta terglobo, de okcidenta Francio ĝis orienta Japanio kaj de norda Svedio ĝis suda Ameriko.

Daŭra frapado de aktivaj popol-demokrataj gek-doj sur la pordoj de la dormintaj gek-doj en Sovjet-Unio kaj iliaj bonaj rezultoj en la esp-ista pacmovado fine vekis ankaŭ tiujn al aktiva partopreno en tiu ĉi giganta laboro. Pardonu ne ĉiuj tie dormis. Kelkaj ĉiam pensis je sia devo. Hodiaŭ ili troviĝas sur altaj postenoj el kiuj ili estas pli kapablaj helpi al ni.

En la Lingva Instituto de la Ŝtata Akademio por Sciencoj laboras kiel sekretario nia k-do E. A. Bokarev, prof. Vinogradov kaj aliaj. Gravan funkcion havas malnova esp-isto k-do A. Borisoglebskij en la mondkonata Miĉurin Instituto en Miĉurinsk. Pere de tiuj bravaj pioniroj kolektiĝas sub la paca standardo de nia majstro jam la fidele restintaj gek-doj el ĉiuj landoj de la vasta Sovjet-Unio, de Estonio, de Ukrainio, Morgolio, Besarabio, Turkmenio ktp. por kontribui per Esperanto al la mondpaco.

Jam estas en preparo fondo de Sovjet-Unia Esperantista Pacmovado, eldonado de propra gazeto kaj valora literaturo por reciproka interŝanĝado.

La ĉefaj baroj do estas rompitaĵoj. Nur tie kaj ĉi tie iuj neinformituloj ankoraŭ kontraŭstaras nian movadon. Sed baldaŭ jam venos la tempo, kiam ankaŭ la lastaj kontraŭuloj malaperos el la scenejo kaj tiam venos la glora epoko de la internacia lingvo Esperanto en kiu plenumiĝos la revoj de malriĉa, sed bonkora, ĝia kreinto, d-ro L. L. Zamenhof; Esperanto fariĝos posedajiĝo de la tuthomaro, servos al la mondpaco kaj ekstermos la reciprokan malamon inter la nacioj de la mondo. Se la majstro ankoraŭ vivus (kelkaj skribis al ni), li certe ĝojus kaj estus feliĉa el niaj ĝis nun akiritaj rezultoj.

En Ĉeĥoslovakio sukcesplene finiĝis tutŝtata konferenco de esperantistaj pacdefendantoj kiun unufoje post longaj jaroj partoprenis oficiala reprezentanto de registara partio (komun.) de urbestro kaj aliaj neesp. organizoj, kiuj sin praktike konvinkis pri la valoro de nia lingvo kaj bondeziris al nia fruktoplana agado.

La konferencan ĉeestis 316 delegitoj el 90 urboj kaj gastoj el Svedio, Francio, Danlando, Aŭstrio kaj Usono. Salutleteroj atingis ĝin el la tuta mondo. Multaj gazetoj denove alportis raportojn pri nia agado kaj speciale favoran, tutkolan artikolon pri intervjuo kun k-dino M. Robineau el Parizo publikis grava tutŝtata organo de instruistoj "Uĉitelske Noviny". Kvankan tiu konferenco okazis sen antaŭa permeso de la centraj insancoj, ĝi tamen neniel estis ĝenita kaj la nura fakto, ke ĝi en Ĉeĥoslovakio povis procedi, estas jam grava argumento en la manoj de niaj kunbatalantoj en ceteraj popoldemokrataj landoj por postuli nun de siaj registaroj la samajn rajtojn kaj ankaŭ al niaj sovjetaj gek-doj tiuj faktoj multe plifaciligas iliajn agojn.

Sekve de tiuj kaj aliaj atingitaj sukcesoj ligiĝas al ili daŭre pluaj. Baldaŭ ni ricevos valoran literaturon el Pollando k. Bulgara Esperanto Asocioj por kies eldono ili jam ricevis oficialan permeson. Ankaŭ niaj sovjetaj k-doj promesis eldonon de esperanta gazeto kaj literaturaj verkoj.

Se en la UNESCO-konferenco de Montevideo la sovjet-uniaj kaj popoldemokrataj delegitoj tiufoje ankoraŭ sindetenis voĉdoni por la enkonduko de Esperanto en lernejojn, do tio nur signifas, ke ili celis gajni tempon por funde esplori kaj praktike konvinki pri la valoro de Esperanto la servo por la bono de la tuthomaro. Tamen ilia ĝis nun nea sinteno jam tiom grade ŝanĝis, ke en kelkaj Popoldemokratioj, kie ankoraŭ antaŭ netrolonga tempo regis la oficiala tendenco kontraŭi kaj sufoki la Esp-movadon, nun estas trankvile tolerata kaj en kelkaj ĝi eĉ ĝuas jam videblan oficialan aprobon. Dependas nun ĉefe de la esp-istoj en la koncernaj landoj mem, kigrade ili per sia agado

kaj laboro sukcesos konvinki la oficialajn instancojn pri la valoro de Esperanto, ĉar laŭ tio rezultos eventuala nova internacia voĉdono.

Iuj legantoj eble riproĉas, ke mi tro specialigis min al nia movado en Popoldemokratioj. Tio ŝajnas esti. Sed necesas kompreni, ke ĉiu sukceso atingita en la popoldem. landoj samtempe grave kontribuas al niaj kunbatalantoj en aliaj landoj povi enpenetri la larĝajn popolamasojn.

Estas ja ĝenerale konata, ke multaj laboristaj organizoj, respektive ties gvidantoj, en landoj kun aliaj reĝimoj sin strikte kondutas laŭ la decidoj kaj direktivoj de la gvidantoj en Sovjetunio kaj Popoldemokratioj el kiuj ili prenas ekzemplon kaj instruojn. Precipe la komunistaj partioj en landoj kun aliaj reĝimoj (kaj tiuj ne estas malmultnombraj) ne favoras Esperanton, ĉar ĝis nun ili vidis, ke Sovjetio kaj Popoldemokratioj ĝin ne subtenas.

Ni povas esti afliktitaj, ke tuj kiam ili rimarkos ŝanĝon de la sinteno en tiuj landoj, ili ankaŭ asimiliĝon kaj tiam ni sukcesosplifacile enpenetri iliajn organizojn por importi Esperanton en plilarĝajn tavolojn de la popoloj.

La mondo estas nedividebla kaj ankaŭ la esp-istoj de okcidento povas nenion sukcesi sen esperantistoj de oriento kaj male. Unu parto dependas de la alia kaj estas nedivideblaj. Ju pli la reciprokaj rilatoj kaj kunlaboro firmiĝas des pli ni proksimiĝas al nia fina celo.

La ĝis nun atingitaj rezultoj en tiu ŝanco alportis por ni jam rimarkindajn sukcesojn. Tio kompreneble ne povas esti kaŭzo ankoraŭ, por ke niaj gek-doj kredu, ke eblas jam ripozi sur la "venkaj laŭroj". Ankoraŭ forpasos kelka tempo ĝis kiam nia movado atingos la finan venkon. La ĝisnunaj sukcesoj devas esti nur plua impulso k. instigo al plia aktiveco kaj celkonsciiĝo de niaj konvinkitaj pri la praveco de nia afero kaj ties nepra, jam proksima fina venko. Tiam ni sukcesos ankaŭ facile infekti per tiuj opinioj niajn ĉirkaŭvivantojn. Ni ne nur povas uzi Esperanton por niaj privataj individuaj kaj distraĵoj celoj, sed necesas ĝin praktiki por la bono de la tuto, de la tuthomaro, se ni volas atingi ties interesiĝon.

Unu el la plej eminentaj interesoj de la homaro estas la konservo kaj sekurigo de la mondpaco, la forigo de la A kaj H bomboj kaj ceteraj amasmortigiloj. La homaro sendiference deziras vivi en trankvilo kaj paco. Se ĝu konvinkiĝos, ke Esperanto al tiuj celoj grave kaj ĉie kontribuas, ĝi iros kun ni kaj akceptos ĝin.

En tiu senco ni pli intensigu ankoraŭ nian strebadon kaj tute certe ni baldaŭ atingos tion, pri kio niaj antaŭuloj nesufiĉe lerte ĝis nun vane klopodis.

Rudolf BURDA

NASKIĜAS NOVA ESPERANTO MOVADO EN SOVJET-UNIO

Certe ĉiuj esperantistoj kaj precipe la pacdefendantoj konscias pri la graveco kiun signifas la renaskiĝo de la Esp-movado en Sovjet-Unio. Ni jan delonge klopodas diversmaniere por helpi al ties efektiviĝo. Unue ni devis rekonstrui la movadon en la Popoldemokratioj. Kelkaj kredis, ke la vojo al Moskvo por Esperanto kondukos trans Ĉinio. Iam la ĉina Esperanto-movado montris tiajn perspektivojn, sed fine tiu movado fiaskis, submetinte sin al la kontraŭuloj. Komenci rekte en Sovjet-Unio, estis neebla afero kun malplenaj manoj. La tieajn aŭtoritatojn eblas nur konvinki per faktoj. Nek la decidoj de UNESCO sufiĉe impresis la sovjetajn delegitojn. Necesis vasta individua propagando kaj kolektiva laboro, mondskala por konvinki la oficialajn instancojn de Sovjet-Unio pri la valoro de Esperanto. Al tio unuavice kontribuis la fondiĝo de Esp-movado en preskaŭ ĉiuj Popoldemokratioj kaj la praktika uzado de Esperanto por pacaj celoj flanke de ties anaro, kio kulominaciis en fondiĝo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kun siaj filioj kaj reprezentantoj en ĉiuj landoj de la mondo. Abunda esperantista porpaca literaturo kaj vigla koresponda rilato kun la sovjetaj gek-doj al kiuj ni enmanigis argumentojn kaj faktojn, fine nin jam tre alproksimiĝis al nia celo.

Nenion oni atingis per la mallerte skribitaj leteroj al Stalin kaj aliaj sovjetaj instancoj, nek la UNESCO-konferenco multe kontribuis, sed la intensiva kaj persista laboro de la esperantistaj pacdefendantoj fine alportis fruktojn.

Ni lasu pri tio paroli la sovjetajn kamaradojn mem. Jen ni prezentas kelkajn leterojn, kiuj jam klare parolas pri la renaskiĝo de sovjeta Esperanto-movado:

Tula la 6. de aŭgusto 1955

La salutleteron de via Tutŝtata konferenco mi ricevis. Ĝi treege kortuŝis min. Koregan dankon en la nomo de ĉiuj sovjetajlandaj geesperantistoj. Ĉar k-do Bokarev dum du monata libertempo veturis Kaŭkazon por ripozi, mi supozas, ke li ne ĉeestis vian konferencon. Vian bultenon mi regule ricevas. Koregan dankon. De supera scienca laboranto el la Instituto de Miĉurin mi jam ricevis duan leteron. Li estas esp-isto de 1918 kaj estis tre aktiva en ĝismilita tempo. Loĝante en urbo Miĉurinsk li verkadis artikolojn pri Miĉurin kaj sia laboro per Esp-o, kiujn li publikigis en Esp. gazetoj. Pro la altvalora internacia laboro la Instituto ricevis de amiko de Lenin k-do Krĵumovskij oficialan laŭdon kaj dankon. K-do Borisoglebskij iam gvidis Esp-kursojn, kiujn partoprenis 200 komencantoj. Li havis firman kontakton kun eksterlandaj esp-istoj ĝis la milito kaj kun plejaktivaj esp-istoj de nia lando. Ankoraŭ nun li kontaktas kun proks. 30 sovjetaj esp-istoj. Inter ili estas profesoroj, verkistoj, laŭreatoj de Stalin-premio ktp. En la nuna tempo li intencas renovigi sian esp-agadon kaj petas min helpi per aktualaj materialoj. Mi petas, donu per via nomo alvokon al Esp-redakcioj, ke tiuj al li sendu siajn eldonaĵojn.

Evidente li same kiel k-do E. Bokarev ludas gravan rolon por la renaskiĝo de Esperanto-movado en nia lando. Ankaŭ vi sendadu al li vian ŝatatan bultenon. Kun la sama peto mi skribas al k-do Balkanyi, L. Apcher, M. Robineau k.a. Dezirante al via fruktodona peresperanta paclaboro multajn sukcesojn, mi restas kun la plej elkoraj salutoj

Elio KISELEV

1.Krasnij perelok 9, TULA, U.S.S.R

La adreso de k-do. Borisoglebskij estas: Aleksej Daniloviĉ BORISOGLEBSKIJ, Vuz imeni Miĉurin, MIĈURINSK, Tanvovskaja oblast, U. S. S. R.

Li estas preta verki raportojn por Esp-gazetoj pri Miĉurin-laboroj k. a. Skribu multnombre!

Tallin, la 25. 7. 1955

Estimata redaktoro de "LA PACDEFENDANTO"!

Salutante vin el Tallin, mi estav al vi tre dankema por via gazeto k. la en ĝi publikita mia anonco. Ĝi ĝojige plivigliĝis mian korespondadon. Krome mi en la gazeto legis multajn seriozajn kaj ĝojigajn raportojn pri plivigliĝo de nia movado entute, por la paco. Mi estas malnova veterano, iama oficisto ĉe fervojo, nun rentulo. Mi multe korespondis por paco kaj esperas, ke la paco venkos. Kore salutante, restas

via

Johano E s s i

Sovjet-Unio, TALLIN, Paskŭla Kirsi 27 Estonia S. S. R.

Kara kamarado!

Mi kore dankas por la publikigo de mia artikolo. Mi kritancas ricevon de 3 n-oj de PACDEFENDANTO kiun mi kun intereso legis. Vian let. de 28. aprilo mi ricevis la 6. de majo, sed prokrastis la respondon, ĉar mi kuŝis en malsanulejo. Kun granda plezuro mi kunlaborus kun vi plej aktive, kaj malhelpo estas ne mia maljuneco, sed malsano, kiu min ofte devigas iri malsanulejon. Ĝi estas ne resanigebla, la kuracistoj nur povas haltigi ĝian procedon. Hodiaŭ mi povas al vi komuniki novajn adresojn de sovj. esp-istoj kun la peto sendi al ili LA PACDEFENDANTON /jam okazis/. Baldaŭ mi sendos artikolon por via bulteno. Kun kamaradaj salutoj via

Sokolov Boris Ivanoviĉ

Zdolbunovo. Rov, Stalina 43. U.S.S.R.

Kujbyŝev, la 14.8.1955

Mi kore dankas por via sendaĵo: literaturo, "Pacdefendanto" kaj rezolucio. Mi disdonos al niaj gek-doj.

Parte mi jam tradukis ruslingven por diskonigi inter neesperantistoj.

Dankon pro la aperigo de mia adreso. Nun mi ŝuldas al via redakcio. Kiam ni eldonos propran revuon, mi rekompencos vin. Nun ni ricevis dank 'al la anonco preskaŭ 20 leterojn. Kun danko kaj sincera pac-saluto via

V. PISAREV
Ĉapajevskaja 100, ul, 2, KUJBYŠEV,
Ukraina S. S. R.,

Inter la multaj salutleteroj, kiuj atingis la Tutŝtatan konferencon de esp-istaj pacdefendantoj en Ĉeĥoslovakio venis ankaŭ privata letero de supera laboranto en la Lingva Instituto de fama Ŝtata Akademio por Sciencoj, k-do. Bokarev:

Moskvo, la 3. 7. 1955.

Restas ankoraŭ tri tagoj ĝis la komenco de la konferenco en Otrokovice kaj mi ĝis nun ne scias ĉu mi efektive venos. Eble post 1-2 tagoj ni flugos per aviadilo, sed povas esti, ke por tio jam ne sufiĉos la tempo. Pro tio mi samtempe sendas salutleteron.

Via letero al la Sovjet-Unia Scienca Akademio estis favore akceptita kaj la 18. de junio en kunsido de literatura kaj lingva fako de la Akademio estis akceptita decido delegi min al la konferenco via en Otrokovice. Se mi tamen ne venus, dependos nur de iuj formalajoj, por kies plenumo ne restis sufiĉa tempo. Bonvolu diri mian saluton kaj tiun de aliaj sovjetaj esperantistoj al la konferenco.

En la sama kunsido la fako por literaturo kaj lingvoj de la akademio decidis pri fondo de Sovjet-Unia Esperanto-Asocio, kiu funkcios en la kadro de la Scienca Akademio.

Tiu ĉi decido estis akceptita laŭ iniciato de kelkaj influaj sov. lingvoscienculoj: akademiano V. Vinogradov, profesoroj Jarceva, Ĵirkov, Majtinskaja kaj aliaj. La 12. de julio estos konfirmita la Organiza komitato de la Asocio. Inter la membroj da la Org. Komitato estas lingvoscienculo, membrokorespondanto de la Akademio, E. Serebrenikov. La Org. Komitato preparos statuton por la asocio kaj planos la laboron (eldono de revuo, literaturo, propagando de paco, fondo de filioj ktp).

Ni ĉie renkontas aprobon kaj helpon. La legendo, ke Esperanto en Sovjet-Unio ĝenerale estas malaprobata, estas malĝusta. Mi bedaŭras, ke mi ne povas plene informi vin pri ĉiuj niaj klopodoj, ĉar kelkaj niaj iniciatoj ankoraŭ ne estas finplenumitaj. Ni kredas, ke aŭtune jam komencos por ni vigla laboro. Ĉio dependos de nia aktiveco. Bedaŭrinde ni, iniciatintoj estas tre okupitaj homoj. Malfacile estas trovi liberan tempon por Esperanto-laboro, sed ni tamen iom da tempo por tio trovos.

Mi devas ankoraŭ informi vin, ke sekve de via alvoko en "L. P." mi ricevis preskaŭ cent leterojn, sendaĵojn de revuoj, dokumentoj, libroj ktp. Ĉio multe helpis al nia laboro. Mi ne havas eblecon danki al ĉiu sendinto aparte. Mi petas vin, transdonu pere de via revuo mian koran dankon al ĉiuj por ilia kamaradeca kunhelpo.

E. A. Bokarev

= = = = =

Se ni nun tiras la resumon kaj ĉiujn konsekvencojn el la raportoj de k-do Bokarev k. aliaj, ni povas konstati, ke la decidoj faritaj en Moskvo substrekas la pravecon de niaj ĝisnunaj asertoj kaj donas en niajn manojn argumentojn kiuj atestas la ĝustecon de nia nova vojo. Homoj, kiuj ĝis nun kuraĝis diri, ke Esperanto estas ilo de kapitalistoj, kosmopolitaĵo ktp. estas devigitaj eksilenti kaj precipe en la popoldem. ŝtatoj, ĉar espereble baldaŭ oficialiĝos, ke la fama Sovjet-Unia Scienca Akademio ŝanĝis, respektive korektis, sian opinion pri Esperanto dank' al kelkaj eminentaj sovjetaj lingvoscienculoj kaj ankaŭ dank' al la persista kaj senlaca agado de niaj ĉiulandaj esperantistaj pacdefendantoj sub la gvido de la Mondpaca Esperantista Movado.

Ne decus, ke ni nun moku la erarintojn, kiuj sen pliprofundaj esploroj nur blinde ripetis frazojn sed ni montru per ankoraŭ pli granda aktiveco en la monda pacmovado la gravan rolon, kiun kapablas ludi Esperanto en la manoj de sinceraĵ honoj, kiuj deziras nenion pli ol fratan

kunvicon de ĉiuj nacioj kaj por tiu celo per ĉiuj rimedoj sekurigi la tutmondan pacon.

Ne tuj ĉiuj komprenos la novan situacion. Kelkloke niaj gekamaradoj renkontiĝos ankoraŭ kun informitaj homoj, kiuj faros al ili malfacilaĵojn, sed tiuj iam ne povas ĝeni min. Ni venkis, la pravo kaj la vero venkis, kaj malpravuloj devas cedi, eĉ se ili ne plu ĉe prudentaj homoj trovos apogon.

R. BURDA

EL LA VARSOVIA FESTIVALO DE LA JUNULARO

La 6. de aŭgusto okazis en la kadro de la junularfestivalo en Varsovio sukcesplena kunveno de esperantista junularo en "Ĵurnalista Domo."

Preskaŭ ĉiuj polaj tagĵurnaloj informis pri la Esp-kunveno. Ankaŭ en "Festivalnovaĵoj" elgluitaj kiel murafiŝoj la publiko estis informata pri nia kunveno. La Festivalkomitato aparte informis pri nia kunveno ĉiujn naciajn grupojn kaj ankaŭ la pola radio tion disaŭdigis. Post la kunveno kelkaj ĵurnaloj tre favore raportis ĝia procedo.

La Esp-kunvenon partoprenis ĉ. 50 eksterlandaj gek-doj el 14 landoj. Ĉeestis multaj esp-istoj el Polio, reprezentantoj de la pola kaj internacia Festivalkomitatoj, ĵurnalistoj ktp. Entute ĉ. 120 personoj.

La kunvenon prezidis k-doj. T. Michalski (Polio), Ronald Lynn (Anglio) kaj Bertit Englund (Svedio). Estis reprezentitaj jenaj landoj: Norvegio, Islando, Svedio, Danlando, Anglio, Belgio, Nederlando, Okc. Germanio, Francio, Ĉilio, Bulgario, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio kaj Polio. Parolis multaj gek-doj el diversaj landoj. Kelkaj lingvospertuloj rakontis pri lingvaj ĥaosoj okazintaj dum festivalaj kunvenoj. Inter la multaj salut-leteroj vekis la plej grandan atenton letero de 6 studentoj el la Lomonosov-Universitato en Moskvo, kiuj estis laŭlegitaj. Tondra aplaŭdo eksonis, kiam oni legis, ke la fondiĝo de Sovjet-Unia Esperanto-Asocio jam estas fakto.

Estis akceptita de la kunveno grava propono de dana k-do peti la Festivalkomitaton, ke tiu instigu ĉiulandajn komitatojn subteni Esperanton en la preparlaboroj al kaj dum la venonta festivalo, kiu kredeble okazos en Moskvo. Laŭ k-do Michalski la Festivalkomitato jam promesis laŭpove plenumi tiun ĉi proponon. En la amuza programo inter aliaj partoprenis ankaŭ kantisto de la varsovia opero. Iranano, reprezentanto de la internacia festivalkomitato parolis angle al la kunveno, kion k-do R. Lynn tradukis Esp-lingvan.

Ĉiuj invititaj neesperantistaj reprezentantoj estis vere surprizitaj pri la bona funkciado de nia lingvo.

Okaze de komuna vizito de la tombo de d-ro L. L. Zamenhof krom diverslandaj gekamaradoj parolis ankaŭ pioniro de la pola Esperanto-movado, konatulo de Zamenhof, k-do Sakovicz.

La Pola Esp-Asocio ricevis novan 2 ĉambran belan klubejon en centro de Varsovio, kie la diverslandaj gek-doj ĉiuvespere post la festivalprogramoj kunvenadis. Fakte eblas konstati, ke la kunveno de esperantista junularo atingis plenan sukceson kaj neeviteblaj estos ties rezultoj.

Bert. ENGIUND

HELSINKI ALVOKO

Por la unua fojo depost dek jaroj en la malpacigita mondo, kaj dank' al la klopodoj de la publika opinio la estroj de la Kvar Grandaj Potencoj estas renkontiĝintaj. Ili portas la pezon de universala espero. Ilia unua devo estas venki sian reciprokan misfidon.

La tutmonda packunveno, kiu kunigis reprezentantojn el 68 landoj, alportis la certecon, ke malgraŭ gravaj diferencoj, malgraŭ la diverseco de opinioj, interkonsento estas atingebla pri gravaj problemoj kaj per intertraktado eblas jam nun solvi multajn aferojn.

Estas ja la tutmonda opinio, kiu nun stariĝis kontraŭ la politiko de perforto, kontraŭ militistaj blokoj, armilkonkurado kaj terurega danĝero de atoma milito. La kontraktoj de Ĝenevo, la finiĝo de la milito en Indoĉinio, la Konferenco de Bandung, la neŭtraliĝo de Aŭstrio konfirmigita en

kontrakto, la deklaro de Beograd, ĉio, ĉi estas rezultoj de la vekiĝinta publika opinio, kiuj esprimiĝis en la pozicioj de la registaroj.

En la problemo de malarmado kaj atomarmiloj ĝis nun neprogresinta pro necedema kontraŭeco, la vidpunktoj tiom alproksimiĝis, ke interkonsento estas nun nura afero de bonvolo.

Rilate la problemon de sekureco, la principoj adoptitaj de la konferenco en Bandung pruvis, ke nur la tuta kontinento, la pacema kunlaboro inter landoj kun malsamaj sociaj reĝimoj estas starigebla sur tiaj nocioj, kiaj tiuj proklamitaj de Ĉinio kaj Hindio.

La tutmonda packunveno de Helsinki montris, ke oni kunkalkulas la publikan opinion, la Kvara Konferenco devas signi la unuan etapon de eŭropa konstruado garantianta la sekurecon al ĉiuj eŭropaj landoj kaj iganta ilin penetri sur vojon de intima kooperado ekonomia k. kultura. Tiu konstruado estas ligita je la reunuiĝo, ekster ĉia koalicio militista, de Germanio gardata kontraŭ renaskiĝo de militarismo.

Samspirite, la Kvaropa Konferenco devas prepari, por intertraktado la malokupadon de la ĉina insulo Tajvan (Formozo) fare de eksterlandaj soldatoj. Ĝi devas gardi la striktan aplikadon de la kontraktoj pri Indoĉinio, akceptitaj en Ĝenevo. Ĝi devas ebligi al la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj ekiri sur la vojon de l'Universaleco, akceptante la Popolan Respulikon de Ĉinio.

Sed ekzistas ankoraŭ fortoj, kiuj volonte akceptas la malvarman militon kaj kontraŭagas la repacigon inter la Kvar Granduloj. La Helsinki-kunveno alvokas la opinion de ĉiuj nacioj en la mondo, kontraŭstari tiujn fortojn kaj subteni la traktantojn.

La ellaborado de la paco estas fine realigebla se la pacemaj fortoj, kiuj fiksas al si la samajn celojn – kaj precipe la porpacaj movadoj, la grandaj politikaj organizoj el kristana aŭ el socialisna inspiro - kunigas niajn klopodojn por forigi la misfidon kaj gajni la pacon.

Paŝon post paŝo, oni povas solvi la malaĵojn de la mondo kaj finplenumi la esperojn de la popoloj.

El franca lingvo tradukis:

W. Gilbert

Fleury-les--Aubrais.

LA WALL-STREFT MANIFESTO

Sub tiu ĉi frapa titolo skribis Franz Waltjen en N-o , 2. de nova ĵurnalo "DIE ANDERE ZEITWG" en Hamburgo, kiu politike sendepende subtenas la kontraŭagon de germana rearmigo, jenajn ironiajn, sed tre trafajn, liniojn:

"La baldaŭa rearmado de Okcidenta Germanio estas negoco de ĉiuj negocoj! Jen konkuras provincurboj por fariĝi garnizonoj, ili petas ke oni konstruu sur iliaj terenoj kazernojn, aŭ ili promesas tiujn mem konstrui. La SPD (Socialdem. partio de German) ĵus postulis 1.2 miliardojn da DM por la civila aerŝirmo, inter ili 70 milionojn por sangokonservejoj kaj 10 milionojn por infanrekoniloj. FPD (Liberala demokr. partio de Germ.) aliĝis. Mezgrandaj kaj malgravaj liverantoj kverelas pro estontaj mendoj de la armeo. La industrio interkonsentis pri ĉio: ĝi kunlaboras trans marojn

En tiaj cirkonstancoj ŝajnas esti senŝance, admoni al paco. Kie la negoco floras, tie silentas ĉiuj aliaj instinktoj por ioma longa tempo, eĉ tiu de la propra pluekzisto. La tujprofito, jen kio stimulas. Ĉu povas kontraŭefiki timigaj montroj al Hiroŝima, al la 40 milionoj da viktimoj de la lastokazinta vet-armado neparolinte pri Dachau, Buchenwald kaj Osvjecin kun aliaj akompanaĵoj? Oni ja devas pensi realpolitike.

La Manifesto en la preĝejo de S-ta Paulo en Frankfurt a. Main sin turnas tro al la nobleco en la homo.

Kaj tamen, io povus ankoraŭ helpi: Senindulge sincera, la negocemon alvokanta "Wall Street Manifesto"! Se la realpolitike pensantaj homoj povus decidiĝi, la mondon atentigi, ke armado vere estas celo por si mem, ke nia kulturo postulas la provizadon pro la provizado, ke la detruado de komercaĵoj kaj materialoj, sed ne la detruo de homaj vivoj havigas la plejgrandajn profitojn – tiam ĉio estus savita.

La "Wall-Street Manifesto povus naskiĝi ekz. dum festeno de la Mangan-Unio de General Traktors a Calfaktors, de Usentimental Ltd aŭ de la Unuiĝintaj Grubb-Odoraĉ-Fabrikoj, kaj sciu tiel: la fer- kaj ŝtal-reĝo O. Ve. Christianus junior, en Inter- naciaj rondoj de la borso plej bone konata kiel talenta ekonomisto, substreku en sia tosto i. a. , ke li "nun rifuzas la senprudentan babiladon, ke ni armadistegoj deziras riĉiĝi per la suferoj de la homaro. Tute ne estas vere, ke nin interesas la morto de nekalkuleblaj batalionoj! Kio decidiĝas, tio estas ke botoj, uniformoj, entute ekipaĵoj detruigās, ke kiel eble plej multaj kiras-aŭtoj estu dispaŝitaj, ke oni malŝparadu pafaĵon."

"Ĉu estas nia profito, kiam soldato mortas? Dio gardu nin! Tio estas por ni tute indiferenta! Li konsumu kiel eble plej multe da tio, kion ni liveras por ke reliverado necesiĝu. Plion ni ne postulas de li. Kaj la sama validas por la mararmeo, la flugarmeo, eĉ por la loĝantaro. Ke anaro de torpedita ŝipo saviĝu, ni ja ne protestas. Ĉu eble ni neas la rajton do pafrafita flugisto, salti el sia brulanta maŝino? Ĝuste pro tio ni ja fabrikas falombrelojn.

La loĝantaro de urboj, kiuj estas surĵetataj per A- aŭ H-bomboj, utilas al ni neniom, se ili estas mortigataj. Male, ni preĝas por ili, ĉar nia fundamenta religia principo estis, estas kaj restas: Ju pli da postvivantoj, des pli da konsumantoj! (vigla aplaŭdo). Ju pli da konsumantoj, des pli da bezono, des pli da negoco ...

En tiu memento la oratoro kredeble estus interrompita de bruega jubilado, kaj proponata la verkado de la Wall-street Manifesto."

Estas malfacila imagi la komencon de tia rezolucio alian, ol kun la vortoj: "Antaŭ Dio kaj liaj Eklezioj, ni solene deklaras, ke la morto de milionoj da homoj nin tute ne tuŝas. Tiel vere, ne ne ŝatas ĝin. Nur la remendoj de la registaroj estu garantiataj. Oni rajtas pafi en la aeron. Ŝipoj renversiĝu laŭplaĉe. Flugmaŝinoj estu detruataj sur la tero pro nura amuzo. Bandaĝoj, serumoj, kuraciloj kaj ĉio simila estu enterigataj. Militon al la militaĵoj! Ĉiama paco por ĉiama negoco estas nia celo. Obeu al la kvina mandato (verŝajne leĝo) de Dio, vi nepre volas, sed pagu, pagu, pagu!"

La Manifesto verŝajne finiĝus per la alvoko kolekti subskribojn, skribi al deputitoj kaj intervjui predikistojn, redaktorojn kaj radio-komentistojn.

Estas kvazaŭ certe ke tia alvoko ne restus neaŭdita, ĉar ankaŭ armilindustriistoj ne estas fermitaj, se oni al ii pruviĝas, ke paco povas esti pli bona negoco ol milito. Unue rearmigi! Poste komune malarmigi. Kial ne samtempe re- kaj mal-armigi kun neĉesanta energio?

Ĉu vi opinias, ke ĉio ĉi estas freneza? Sed mi petas pripensu, ke aliajn vivformojn ol la tradiciajn ni ja ne scias, kaj ili estas malofte demandataj. Do ni bezonas kompromisojn!

Trad. d-ro A. Halbedl
Aŭstrio

Kopiojn kaj necilingvajn tradukojn bonvolu sendi al la redakcio "DIE ANDERE ZEITUNG", Leinpfad 19, HAMBURG 39, Germanio.

Scienco kaj tekniko:

LA ULTRASONOJ

Sur la ekrano simila al tiu de televidaparato, verdeta linio ĝis nun senmove ekstremas, tordiĝas, deformiĝas: en la masega ŝtalpeco elmetita al ĝia senkompata ekzameno, la dofektoskopo de la sovjeta fizikisto S. Sokolev ĵus malkaŝis, 1 metron profunde, la tre malgrandan fendeton de unu milimetro, kiu kaŝiĝis tie.

Tiuj samaj ultrasonoj pasas en gaso kaj en kelkaj sekundoj la polvo aglomeriĝas kaj precipitatiĝas en malpura akvo, kaj la plej fortikaj mikroboj, kiel tiuj de tuberkulozo, diseriĝas kaj disvolviĝas en tinkturo kaj la malgrandegas eroj de kolorigilo diskrevas en erojn ankoraŭ pli malgrandajn kaj pli penetrantajn, en kuvo kiu enhavas mil metalpecojn sorbigitajn de oleo kaj malpuraĵo, tiuj metalpecoj en 3 aŭ 4 minutoj fariĝas puraj kaj brilaj.

Kiaj estas tiuj ultrasonoj kun tiel misteraj kvalitoj?

Ni perceptas la sonojn, kies nombro da vibradoj troviĝas inter 16 po sekunde per la plej basaj, kaj 20.000 por la plej akutaj. Trans 20.000 vibradoj po sekunde, la sonoj ĉiam ekzistas, sed ni ne plu aŭdas ilin: ili estas ultrasonoj.

Dank' al Paul Langevin, kiu havis la ideon produkti ultrasonojn submetante "sandviĉon" ŝtal-kvarc-ŝtalaje elektra fluo kun konvena frekvenco, la ultrasonoj eliris, en 1914, el la laboratoria kampo.

Dum la de ni aŭdeblaj sonoj disvastiĝas tra ĉiuj direktoj, la ultrasonoj estas kiel lumfasko direkteblaj.

Projekciante ultrasonan faskon en akvo, oni do malkaŝos la ĉeeston de obstaklo en definitiva direkto, dank' al la ricevo de la eĥo produktita de tiu obstaklo, kaj oni scios kiel distance ĝi troviĝas mezurante la tempon forpasintan inter la elsendo de la ultrasono kaj la ricevo de la eĥo.

Estas tiu sistemo, kiu ebligis malkaŝi kaj dronigi multe da germanaj submaraj ŝipoj, kaj estas la sama sistemo, kiu post reveno de paco ebligis al la ŝipoj koni konstante la profundecon de la maro sub si, aŭ al fiŝŝipoj gvidsigni fiŝaregojn.

Sed kvarco estas multekosta kaj precipe, por ke ĝi balanciĝu kaj elsendu ultrasonojn, oni devas submeti ĝin je ekstreme altaj tensioj, de miloj kaj eĉ dekmiloj da voltoj.

La eltrovo de la sovjeta sciencisto V. Vul, koresponda membro de la Ŝtata Akademio por Sciencoj en Moskvo, kiu kreis la ultrasonajn eligilojn surbaze de titanato de berio, ebligas disponigi la ultrasorojn por industriaj procedoj aŭ hejmaj bezonoj.

La titanato de bario estas malpli kosta kaj pli facile akirebla, ĉiudimensie ol la kvarco, kaj precipe, ĝi funkcias por kelkaj dekoj da voltoj.

Tolaĵlavado estis ebla: en 10 minutoj la plej malpura tolaĵo fariĝis pura, sen bolado, ĉar la ultrasonaj vibradoj forrabas la grasaĵon disrompante ĝiajn partikulojn en mikroskopajn pecetojn emulsiigitajn de la akvo. Nun, dank' al la eltrovo de Vul, la ultrasona lavmaŝino jam estas afero de Morgaŭ.

D. L. /"L' HUMANITÉ-DIMANCHRE" /

la 24. 7. 1955.

El franca lingvo tradukis:

W. GILBERT-Francio

POPOLA FILM-MOVADO EN JAPANIO

Post la eksplodo de A-bomboj super Nagasaki kaj Hiroŝima oni multe studis la fizikajn fenomenojn, kiuj sin manifestis pli poste. Estis evidente, ke profundaj skuoj okazis ankaŭ en la morala kaj spirita terenoj. Multaj eksentis fortan honton kaj timon, ili komprenis, ke jen io, de kio la fino estis ne antaŭvidebla. Ili vidis en ĝi kvazaŭ Frankensteinan Monstron.

En Japanio hodiaŭ multmilionoj da homoj serĉas ne venĝon, sed volon, ke la homaro sin savu de tiu monstro.

Post senkondiĉa kapitulacio de la imperialista registaro, la demokrataj fortoj disvastiĝis ĉiuloke kaj organizis sin kiel neniam antaŭe. Tiaj nove liberigitaj fortoj ebligis, post tri jaroj la formadon kaj subtenon de popola film-movado

Tiel parolas dokumento, kiun prunte sendis al ni k-dino Paraige. Ŝi klarigis: "Tiu ĉi raporto estas nekompleta, tute ne priverkita, ĝi baziĝas nur sur informoj miaj."

Tamen, tiu raporto faris al mi la fortan impreson, ke mi ne estas la unua, kiu tion sentas, kion pruvas la vortoj de k-dino Paraige "ĝi malkovras al mi kla plej mirindan film-movadon de la mondo, jes, ĉar ĝi prezentas la volon de la popolo al daŭra paco kaj havas la radikojn en la popolo mem."

La raporto memorigas ke samtempe kun la renaskiĝo de demokrataj fortoj, kontraŭuloj de milito revenis el ekzilo kaj malliberejoj. Ekz. profesoro Cojama, kiu reveninte fariĝis unu el la iniciatintoj de la film-movado, du pentristoj, kiuj rapidis al Hiroŝima desegni la teruraĵojn, kiujn ili poste spite la oficiala malpermeso, unue en Tokio, poste tra la tuta lando disvastigis (rim. de red.: mi opinias, ke ili jam estas disvastigitaj en la tuta mondo). Profunde skuitaj rigardintoj amase subskribis la "Stokholman Pacalvokon". En la jaro 1952, kiam finfine oni permesis publikigi la veron pri Hiroŝima, estis produktita filmo surbaze de tiuj desegnaĵoj.

Dum la pentristoj eluzis siajn desegnojn, studentoj en universitato kontribuis per kolektado de skriboj, trovitaj en la poŝoj de mortintaj soldatoj. Tiun kolekton ili publikis sub la titolo

"AŬSKULTU LA VOĈOJN DE OCEANO!" Multaj esperantistoj tiun broŝuron certe jam legis. En 1952 ĝi estis filmigita.

Ankaŭ la progresema verkisto Hiroshi Nema verkis "Vakuan Zonon". En ĝi la aŭtoro pasie denuncas la militpotenculojn, kiuj devigis junajn soldatojn fariĝi sovaĝaj bestoj. "Vakua Zono" ankaŭ fariĝis filmo. Profesoro Osada kolektis de infanoj leterojn, el kiuj li kompilis libron "INFANOJ DE L' ATOMBOMBO". Tiu libro fariĝis fundamento de du filmoj.

Kiam la nova konstitucio estis en danĝero, la popola film-movado helpis ĝin defendi. Vere la laboroj priskribitaj anticipis la filmojn. En 1945-47 la popola film-movado ne ekzistis. Okazis striko ĉe la film-produktejo "Toho Film Kompanio" en 1947. Kelkiloj da laboristoj estis maldungitaj, ne nur pro tio ke ili postulis bonajn vivkondiĉojn, sed ankaŭ pli bonajn filmojn. En tiu tempo eksterlandaj filmoj, kiuj glorigis militon, perforton kaj luksan malmoralan vivon, invadis Japanion kaj Japanoj kontraŭ ili protestis. Policistoj kun armiloj, tankoj kaj pafmaŝinoj kruele subprenis la protestintojn, sed ne ties spiriton, kiu baldaŭ esprimiĝis per la agit-vortoj "Ni produkti niajn proprajn filmojn!"

Unu jaron poste naskiĝis la Popola Film-Movado. Ĝi estis miraklo de komuna volo kaj celo - filmoj por la popolo, pri la popolo kaj per la popolo. La unua tasko estis eduki la popolon por akiri ties intelektan kunlaboron. Film-rondoj formiĝis, unue en Tokio, poste en la tuta lando. Aktoroj, direktoroj renkontis la publikon kaj amike diskutis kun ĝi. Pli kaj pli vidiĝis, ke filmoj fariĝas afero de ĉiu homo kiu volas forĝi la estontan feliĉon de Japanio.

Tiam en 1950 komencis la milito en Koreio. Japanio ankoraŭ estis okupata miltbazo. La nova konstitucio estis minacata. Homoj diversopiniaj kunfandiĝis en malamo al milito. Gravas rinarkigi tion, ĉar ĝi klarigas la unuecon de la pacbatalo en Japanio.

Geaktoroj kaj eĉ direktoroj protestis kontraŭ la milito en Koreio. Ili estis forpelipaj, sed ne venkitaj. En la kontraŭstara fronto ankaŭ troviĝis la teatra grupo "Zen-Sin-Za", kiu kun aliaj geaktoroj portis siajn prezentantojn al fabrikoj kaj vilaĝoj. Ĉie ili informis pri la projektata film-movado kaj kreis subtenajn grupojn. Malriĉaj laboristoj inter si kolektadis monon por donaci al la film-kaso. Kvankam por tiaj homoj tio signifis grandajn oferojn, ili persistis dum jaroj. Ankaŭ organizoj kunhelpis.

70 famuloj iniciatis la unuan filmon, dancistoj, muzikistoj aktoroj, direktoroj partoprenis. Sed la mono, kolektita dum 3 jaroj, sufiĉis nur por produkti la filmon kaj vivteni la produktantojn. Tamen, neniam komerca filmo kunigis tiom da eminentklasaj filmistoj en unu produkto. La aparatoj esti malnovaj kaj tre ofte oni devis halti la procedon por ripari ilin. Ankaŭ la "nigra mano" de la reakcio sin montris. Policistoj multe malhelpis, ili eĉ traserĉis la domojn de la aktoroj, difektis filmojn kaj ĉiamaniere obstrukciis la produktadon. La filmo estis granda sukceso. Eĉ la reakciaj ĵurnaloj laŭdis ĝian realismon. La sukceso de la filmo instigis la reakciulojn al pli forta kaj malinda antagonismo. Sed vene, unu jaron poste, tri pluaj filmoj kompletiĝis. Spaco mankas por rakonti ĉiujn malfacilaĵojn trapasitajn. Estis vera triumfo de solidareco.

Tiuj kvar filmoj temis nur pri la vivo de la japana popolo. De 1945 ĝis 1952 la okupantoj malpermesis publikigi la veron pri Hiroŝima kaj Nagasaki. Kiam forpasis tiu termino, nur tiam la tuta japana nacio eksciis la veron pri la teruraĵoj de la atombombo. La popola film-movado tiam koncentrigis sian agadon kontraŭ la milito kaj rearmado. En 1932 montriĝis granda ekfloro de porpacaj filmoj (la raporto de k-dino Parage donas detalojn pri 8 filmoj – estas aliaj).

La mono por produktado venis nur el la poŝoj de la popolo. Neniu kapitalisto partoprenis. Jen ekzemplo: la filmo "HIROŜIMA" ... la nacia sindikato de geinstruistoj ĝin iniciatis. 500.000 geinstruistoj donacis 25.000.000 da jenoj, aliaj sindikatoj helpis. Kolektiĝis entute 100.000.000 da jenoj. Aktorino Yumeji Tsukioka ludis gravan rolon sen salajro. 40.000 personoj, kiuj perdis siajn parencojn en Hiroŝima sin proponis por helpi.

La filmo estis preta por vidiĝi antaŭ la publiko en oktobro 1955, sed la firmao, kiu kontraktis por distribui ĝin, sub politika influo, lastmomente rifuzis tion fari.

La konscio de la japana popolo vekigis kontraŭ la A- kaj H-bomboj: Organzoj formiĝis, patrinaj kuniĝis por defendi siajn infanojn, eĉ infanoj kuniĝis, por helpi unu la alian. Kampanoj por la unua fojo sin organizis por kontraŭstari la okupantojn, plue ili kuniĝis kun la laboristoj kaj

fiŝkaptistoj, anstataŭ resti izolitaj kiel antaŭe. Ankaŭ inter la intelektuloj tiusencaj asocioj multobliĝis.

Tiu ĉi disflorado de la popola agado kaj la filmmovado sin reciproke subtenis. Grava flanko de tiuĉi progreso estis provizado de speciala, sed simpla aparato. Oni uzas lampan projekciilon kun rubandaj filmoj kaj malgranda ekrano. Tion eblas procedi en malgranda ĉambro. Oni reprenetas senmovajn bildojn dum kio la parolanto trovas sufiĉan tempon por klarigi. Tiamaniere oni atingas la kamparanojn kaj urbet-anojn, kiuj ne povas viziti kinejon. Formiĝis kompanio por produktado de ĉi tiu aparato, kiu laboras man-en-mane kun la popola film-movado. Tiel la pacedukado atingas finfine ĉiujn en la lando. Admirinda entrepreno, kiu neniun forgesas.

* * *

Ĉe fino k-dino Paraige diras:

"Ju pli tiu movado en Japanio disvastiĝas, des pli da novaj filmoj fariĝas bezonaj. Japanoj tre ŝatus ricevi progresemajn filmojn el eksterlando pere de interŝanĝoj. Bonŝance en Londono ekzistas Film-rondo, kiun mi uzos por tiu celo. Ankaŭ en Anglio ni bonvenigus filmetojn el aliaj landoj. Se vi havas eblecon interŝanĝi, kontaktu kun mi." +)

La alvokon de k-dino Paraige sub la Alvoko de Vieno. La hungara popolo unuece protestas kaj batalas kontraŭ la rearmado de Okc. Germanio kaj por la malpermeso de la atomarmiloj.

La unuecon montris la hungara popolo jam en 1950 post subskribo de la stockholma alvoko de la Monda Packonsilantaro, sed la nuna subskribado multe superis la pli fruajn. La simplaj batalantoj por la paco, la organizoj diversaj akceptis la alvokon: "Ni vizitu ĉiun domon, ĉiun hejmon!" Oni komprenis, ke ne hazarde alvokas la Monda Packonsilantaro samtempe por la malpermeso de atom-armiloj kaj kontraŭ la germana rearmado. Ambaŭ estas forte kunligitaj. La usona imperialismo volas doni en la manojn de al ĉiu pretaj ekzekutistoj el la dua mondmilito la plej ekstermigajn armilojn! La vian alvokon subskribis 7, 146, 480 Hungaroj, multe pli ol la stockholman kaj berlinan. Denove pluraj centmiloj ekkonsciiĝis pri la granda danĝero kiu minacas la mondon.

La rezulto de la subskribado signifas, ke en Hungario ĉiu plenkreskulo subtenas la alvokon de la Monda Packonsilantaro.

La ĉefa tasko de nia 4a landa packongreso plenumiĝis: Ni trovis la vojon al porpaco zorgemaj, sed ankoraŭ ne agpretaj koroj.

La preparantoj de nova milito devas kalkuli, ke ĉiam plimultaj centmiloj, milionoj ekstaras por kontraŭi iliajn murdajn planojn.

La subskriboj deklaras, ke oni volas honeste kunlabori, kunagi kun ĉiuj popoloj, kun ĉiuj progresemaj, kun ĉiuj pacvolaj homoj de la mondo, por labori, per plibonigi la vivon, por esti pretaj defendi la pacon!

En tiu senco laboras ankaŭ la anoj de Mondpaca Esperantista Movado en la Popoldemokratioj helpante al la pacbatalantoj pere de rekta kontakto inter ĉiuj rasoj kaj kontinentoj, pruvante la neceson, uzi ĉiujn rimedojn por la bono de la homaro, por kulturo, konstruado, por la paco! En tiu senco akceptu niajn pacsalutojn la kunbatalantoj en ĉiuj landoj!

Pál BALKÁNYI
Budapeŝto

PATROLA RENKONTO

Patrolo devos eliri noktomeze por ion aŭskulti kaj, se eble, kapti iun ajn pli nesingardeman malamikon.

La neĝo falis, la tuta pejzaĝo blankiĝis.

La arboj, kvazaŭ fantomoj, neĝe vestitaj, rigardas siajn ombrojn, kiuj kaŝludas kun la luno.

Tiu ĉi, plena je sia fikcia brilo, miras malvarmege la laktan ebenajon.

Nur ĉiufoje, kiam kolumboblankaj nubetoj preterpasas la ĉielreĝinon, ĝi vole nevole sin kaŝas de la fantomoj, elviŝante la ombrojn de sur la neĝo.

Blanka mirteatraĵo. . . .

Kisataj de la lunlumo milmilionoj da brilneĝeroj tremetas diamante kaj la rebrilo ĉe la

multnombraj branĉoj kaj branĉetoj, tute de brilaĵeroj kovritaj, ŝajnas speguli la palpebrumadon de la steloj

- Serĝento, kunigu la knabojn, ni baldaŭ eliros. Envicigu ĉiujn, rapidu!

Kaj la subleŭtenanto malantaŭen marŝis tridek paŝojn ĝis granda kruco antaŭ kiu li genuis en fervora preĝo.

La Krucumito lin rigardis.

Tiu Krucumito ne reprezentas vulgaran kadavron. Li estas sur la tero, Dia reprezentanto, Li estas Dio mem, la Ĉiopova, la Ĉioscia.

De la supro de Sia observejo Li rimarkas ne nur tiun ĉi subleŭtenanton, sed, trans la "Nenies-Tero", la komandanton de la elironta malamika patrolo, kiu ankaŭ sin turnas al Li, kredema, esperante al Lia Ĉiopoveco, sian indulgon kaj la feliĉon de sia milita tasko.

Ho, jes. Li ne reprezentas vulgaran kadavron.

Nur la pastroj malfidas lian Povon kaj preferas ŝirmi per fulmlogiloj la terajn Diosidejojn, la luksajn preĝejojn, kie ili ludas sian komercan rolon.

+ + + +

La nokto estas tro luma por dueli.

Ambaŭ la komandantoj pensis sekvi pliŝirme la saman frostigitan drenkanaleton.

Ili falas kune kun siaj homoj unuj sur la aliajn kaj terure batalas, baraktas kaj reciproke ekstermigas.

La sekvantan tagon, du tagordonoj^{+) laŭdis la respektivajn heroojn, la du oficirojn, kiuj, benitaj de Dio, tiel kuraĝe sciis morti kaj mortigi por la bono de la patrio-regantoj.}

Saldanha CARREIRA

^{+) klarigo: Tagordono = ĉefa komandanto de kazerno ĉiutage dum certa horo kunvokas la soldataron por deklari siajn ordonojn, inter kiuj li proklamas ankaŭ laŭdojn kaj punojn. La red.}

EL AZIA-AFRIKA KONFERENCO

Reprezentinta 1,400,000.000-popolon, kaj kunvokita per la invito de la ĉefministroj de Birmo, Cejlono, Hindio kaj Pakistano, la Azia-Afrika konferenco kunsidis en Bandungo de la 18a ĝis la 24a de aprilo 1955. Krom la nomitaj iniciatintoj partoprenis la sekvantaj 24 landoj: Afganistano, Kamboĝio, Popola Respubliko Ĉinia, Egiptio, Etiopio, Ora Bordo, Irano, Irako, Japanio, Jordanio, Laoso, Libanono, Liberio Libio, Nepalo, Filipinoj, Saŭdi Arabio, Sudano, Sirio, Tajlando, Turkio, Dem. Resp. de Vietnamo, Ŝtato Vietnamo kaj Jemeno.

El la raporto de A.A.K. la jenon elĉerpis kaj esperantigis la "Rondo de Homaranoj": Sekcio de kultura kunlaboro. La "A.A.K." notis la fakton, ke la ekzistado de koloniismo en multaj partoj de Azio kaj Afriko, en kia jan formo ĝi estu, ne nur malhelpas la kulturalan kunlaboron, sed ankaŭ subpremas la naciajn kulturojn de la popolo. Kelkaj koloniantaj potencoj neis al siaj dependaj popoloj la bazan rajton en la sfero de edukado kaj kulturo, kio baras la disvolviĝon de iliaj personecoj kaj ankaŭ malhelpas kulturalan interkontakton kun aliaj aziaj kaj afrikaj popoloj.

Tio ĉi estas aparte vera en la kazoj de Tunizio, Alĝerio kaj Maroko, kie la baza rajto de la popoloj por studi siajn proprajn lingvojn estas subpremata.

Simila distingtraktado estas praktikata kontraŭ Afrikanoj por studo de iliaj lingvo kaj kulturo, kiuj estas subpremitaj.

Simile oni agas kontraŭ la afrika kaj kolorhaŭta popolo en kelkaj partoj de la kontinento de Afriko. La konferenco sentis, ke tia politiko sumiĝas je neado al la fundamenta homrajto, baras la kulturalan antaŭeniĝon en tiuj regionoj kaj ankaŭ malhelpas kulturalan kunlaboron en la kadro de pli vasta internacia plano.

La konferenco kondamnas tian neadon al la fundamenta rajto en la sfero de edukado kaj kulturo en kelkaj partoj de Azio kaj Afriko pere de ĉi tia kaj aliaj formoj de kultura subpremado.

Speciale, la konferenco kondamnas la rasismon kiel rimedon por kultura subprenado

La A.A.K. deklaris, ke la politikoj kaj praktikoj je rasaj apartigo kaj distingtraktado, kiuj formas la bazon de registaro kaj homaj rilatoj en vastaj regionoj de Afriko kaj aliaj partoj de la

mondo, estas ne nur hontinda malobservo al homrajtoj, sed ankaŭ neado al la fundamentaj valoroj de civilizacio kaj la digneco de la homo.

La konferenco etendis sian varman simpatian kaj subtenon al la kuraĝa starado age de la viktimoj sub rasa distingtraktado, precipe la popoloj afrika, hinda kaj pakistano-devenaj, en Sudafriko; aplaudis ĉiujn, kiuj persistas en sia celado, rekonfirmis la firman decidon de la azia-afrikaj popoloj elradikigi ĉian postsignon de rasismo, kiu ekzistis en iliaj propraj landoj kaj ĵuris uzi sian plenan moralan influ-povon por subteni la batalon ĝin elradikigi.

Konsiderante la ekzistantan politikan streĉiĝon en la Meza Oriento, kiun kaŭzas la situacio en Palestino, kaj la danĝeron de tiu streĉiĝo minaca al mondpaco, la A.A.K. deklaris, ke ĝi subtenas la rajtojn de la araba popolo de Palestino kaj elvokis la efektivigon de la UNO-rezolucioj pri Palestino kaj de la paca solvo de la palestina problemo. "Problemo de dependaj popoloj":

La A.A.K. en la kadro de sia klarigita sintenado pri la abolicio de Indonezio, en la kazo de Okcidenta Irano, surbaze de reciproke faritaj konsentoj inter Indonezio kaj Nederlando.

La A.A.K. urĝigis la nederlandan registaron rekomenci negocojn por kiel eble plej flue plenumi siajn devojn sub la supre menciitaj interkonsentoj kaj esprimis la fervoran deziron, ke UNO helpu la koncernajn partiojn por trovi pacan solvon pri la disputo.

Konsiderante la maltrankviligan situacion en Norda Afriko kaj la persistan neadon al nordafrikaj popoloj pri ilia rajto de memdecido, la A.A.K. deklaris, ke ĝi subtenas la rajtojn de la popoloj de Alĝerio, Maroko kaj Tunizio je memdecido kaj sendependeco, kaj urĝigis la francan registaron doni pacan solvon pri la problemo senprokraste.

/El "OOMOTO" n-o. 177-178./

HISTORIO DE LA TIMO

Nikolao Berdjajeff skribis: La tuta historio de l'Okcidento inter la du mondmilitoj estis decidita de la timo antaŭ la komunismo.

Li alludis la historion inter la unua kaj dua mondmilitoj. Sed, ĉu estonta historiisto povos skribi aliel pri la historio de l' Okcidento inter la dua kaj tria mondmilitoj? De kio alia la okcidenta burĝaro ja estas hodiaŭ decidigita, krom de timo antaŭ la komunismo? De timo, kiu abundiĝas kaŭze de gravega kulpo! De socia kulpo, kiu neniel klopodis efektivigi justecon.

Ĉi kulpangoro ankoraŭ pelos la Okcidenton en la perfortaĵon da la atomkrimego, se ĝi ne trovos vojon de konvertiĝo. Ĉi tio estas leĝo senindulga.

Multe pli malbona, ol la komunismo povas esti eĉ en la plej aŭdaca inkubo, estas la angoro pro la komunismo, el kiu angoro iam nepre naskiĝos la murdo amasa.

(el "DIE ANDERE ZEITUNG - Hamburg) tradukis d-ro. Halbedl

ESPERANTO EN HUNGARA RADIO

Post multjara silento denove aŭdiĝis voĉo en kaj pri Esperanto en la hungara radio.

La 27an de julio posttagmeze kaj vespere oni disaŭdigis dum la kutima duonhora finlingva programo 10minutan intervjuon kun k-do. Pal Balkányi pro peto de finnlanda korespondanto de la radio-stacio, k-do. Kavenius, ĵurnalisto en Turku. En la intervjuo k-do. Balkányi rememoris pri sia renkonto kun finnl. Popolo kaj literaturo okaze de Universala Esp-Kongreso en 1922 en Helsinko kaj raportis ankaŭ pri sia korespondo kun la tuta mondo per Esperanto por la mondpaco kaj interamikiĝo. 28/7 la sama disaŭdigo ripetiĝis.

La 17/7. dimance dum kutima progreso en t.n. "Radio-Leksikono" oni petis la aŭskultantojn respondi jenan demandon:

Kio estas la internacia lingvo Esperanto kaj, kiu estis ĝia aŭtoro? Samtempe estis anoncita ke klarigon oni disaŭdigos la 31. de julio dum la sama programo. Por la plej bonaj respondoj estis deklarita konkurso.

5-minutan tre objektivan respondon donis profesoro de budapeŝta Lingvoinstituto, menciante ankaŭ, ke d-r Zamenhof mem komencis krei la Esp-literaturon, tradukante klasikaĵojn kaj

ankaŭ la similajn verkojn de d-ro Kalocsay. Radio-Budapest disaŭdigis, ke inter ĉiuj demandoj de la "Radio-Leksikono" plejgranda intereso inter la aŭskultantoj montriĝis por tiu ĉi temo kaj ke, inter la korespondantoj la unuan libropremion ricevis Pál Balkányi el Budapeŝto. Eble estis la unua kazo, ke tiu radio-stacio donis premion por raporto pri Esperanto.

Tre utila estus, se multaj diverslandaj radioaŭskultantoj menciante la suprajn dissendojn memorigus Radion-Budapest, kiel efike ĝi uzis Esp-on preskaŭ ĉiutage antaŭ kelkaj jaroj en la kadro de siaj sciigoj kaj petus ties revivigon kun artaj, literaturaj komplementoj.

Red.

-16-

LETERO EL NEW-YORKO

La 24.de aŭgusto 1955

Apenaŭ mi povas esprimi mian ĝojon okaze de alveno de salutletero de la I.Tutŝtata Konferenco de Esp-Pacdefendantoj en Otrokovice.

Mi tre dankas al ĉiuj subskribintaj gekamaradoj.

De tia, kiam mi partoprenis la unuan mondmiliton, mi ĉiam estis sincera pacbatalanto kaj volonte deziris helpi la mondpacan esperantistan movadon.

Mi neniam zorgis kun la ordonoj de la tiranoj. Mi estis kaj estas ĉiam sub policia observo. Malgraŭ spite ĉi tie en Usono kaj ĉefe en Novjorko ni aranĝas packunvenoj ĉiam.Vi kaj viajn kunlaborantoj salutas korege via sincera amiko. G.G.New-Yorko

Adreson ni ne publikas pro danĝero de persekuto.

ANTAŬEN FORĜANTOJ DE NOVA MONDO!

(Tiu raporto atingis nin malfrue el Zaragoza /Hispano/, sed vi tamen scii, ke MEM ankaŭ laboras tie, kie la nacilingva pacmovado ankoraŭ ne havas kontaktojn)Zaragoza 8/7.55

Antaŭ la impona kaj grava renkontiĝo de esp-istaj pacdefendantoj en Varsovio, kiu fakte samtempe honorigos nian majstron Zamenhof, kiel MEM-ano, kiu ne estas, sendas de tiu ĉi hispana infero al ĉiuj, bravaj pacdefendantoj, miajn plej ardajn kaj elkorajn salutojn.

Kvankam bedaŭrinde multe da pacamantoj ne povas partopreni persone viajn kunvenojn, ne pro tio karaj verduloj, mankos al vi la morala helpo de sennombraj pacamantoj, kiuj sentas kaj havas la samajn dezirojn kiel vi kaj kiuj en tiuj tagoj spirite estos kun vi.

Mi estas plenkonzvinkita karaj gesamideanoj, ke la forto de la pacanaro tagon post tago pli-gradiĝas tielmaniere, ke ne estas malproksima la tago, en kiu finfine nepre malaperos ĉiuj instigantoj de novaj militoj.

Mi deziras, ke viaj decidoj estu fruktodonaj. Nia devo estas, defendi la pacon por ĉiuj disponeblaj rimedoj. En tiu ĉi senco ni laŭte vokas al vi:

Vivu la paco kaj progreso!

Antaŭen do, forĝantoj de nova, pli feliĉa mondo ol estas la nuna!

Subskribo nelegebla (kaj ankaŭ ne ebla)

ESPERANTO KAJ STENOGRAFIO

Prof.E.Bokarev de Lingvistica Instituto en Moskvo ricevis novan dokumenton pri utiligo de Esp-o:

En pariza revuo „La Verité en Sténographique“ (t.e.La Vero Stenografio) n-oj 88-89 de junio-sept.1955 paĝoj 31-33 estas publikita artikolo „La Sténographie en Union Soviétque“. Ĉe komenco de la artikolo estas indikite, ke ĝi estas ricevita de esp-isto kaj ĉe la fino, ke la Esp-tradu kun fariss

A.Staňura (ĈSR) kaj la francan G.Provost. Ekzemplero de ĉi numero estis sendita al k-do. E.Bokarev.

A.Staňura Ĉeĥoslovakio

ATENTU!

Esp-murgazet-artikolo el Hungario vekis intereson ĉe tipografia uzino en Kujbyŝev. La gvidantoj projektas Esp-rondeton fondi. Por antuna ekspozicio sendu baldaŭ materialon al k-do. V.Pisarev, Ĉapajevskaja 100, kv.2, KUJBIŜEV, Sovjetio.

- 17 -

INTERKOMPRENO PER LA MANOJ

La batalo por la paco kaj por defendi la pacon jam atingis sian kulmiancion.

La teruraj amasmortigiloj, la atom- kaj hidrogenbomboj starigis la homaron antaŭ alternativon – elekti vivon aŭ morton.

En ĉiuj landoj kaj mondpartoj la homoj sin organizas al batalo kontraŭ sangavidaj frenezuloj, kiuj intencas pereigi la mondon. Sur nia planedo vivas proksimume 3 miliardoj da homoj kaj la granda plimulto deziras pacon. Ni devas elekti kaj decidi, ĉu ni defendos la pacon sur nia planedo aŭ lasos ĝin detruiri.

Mi opinias, ke ni esperantistoj elektis la ĝustan vojon kiam en Sankt Pölten estis fondita la Mondpaca Esperantista Movado.

Tiu movado kontentige disvastiĝas tra la tuta mondo. Anoncas sin esperantistoj, kiuj deziras labori por la paco pere de nia kara lingvo.

Samideanoj, ankaŭ vi povas aldoni la manon al kunlaboro pere de viaj lokaj pacmovadoj. Aliĝu al ili kaj tiamaniere vi bone servos al Esperanto kaj ni ĉiuj baldaŭ konvinkos la superajn instancoj pri la utileco de nia lingvo.

Fine mi volas mencii episodon de juna k-dino, kiu prezentis en regiona konferenco de pacdefendantoj en nia urbo, sian travivaĵon en Germanio, kien ŝi estis delegita de la Ĉeĥosl. Junularligo. Inter alia ŝi diris:

Multon mi vidis, detruitajn domojn kaj ankaŭ jam novkonstruitajn kvartalojn kaj mi nun scias taksu valoron de paco.

Je la fino de nia restado en Germanio mi ĉeestis amuzaĵon, kiun partoprenis kvar nacioj, Germanoj, Poloj, Rusoj kaj Ĉeĥoj. Se ni alimaniere ne sukcesis inter-kompreniĝi, ni uzis la manojn kaj vere, ni bone amuzis nin.

Kia domaĝo, ke mi nepovis tuj publike respondi al tiu juna reprezentantino de la Junular-Ligo.

Niajn kongresojn kaj konferencojn partoprenas ofte pli ol 30 nacioj kaj ni tre bone inter-kompreniĝas per unu komuna lingvo de buŝo al buŝo, de koro al koro. Pro tio karaj gekamaradoj, valoras lukti por nia nobla ideo, por la ĝenerala uzado de nia internacia lingvo.

F.Pytoun, Ĉeĥoslovakio

Pri La Rumana Packonferenco

La 22 de majo komencis en Bukareŝto, en Palaco de Granda Nacia Konsilantaro, la laboroj de la rumana konferenco por la defendo de la paco.

Antaŭ la konferenco okazis en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj intensivaj preparoj por tiu ĉi festo.

En kunvenoj oni preparolis la ardajn problemojn kiel defendi la pacon, elektis novajn komitatojn kaj delegitojn por la landa konferenco en Bukareŝto. Samtempe oni kolektis subskribojn por la rezolucio de la Monda Packonsilantaro. Centoj da delegitoj venis al la konferenco por esprimi la opinion de ĉiuj tavolo de la rumana popolo rilate al aktualaj problemoj de la internacia situacio kaj la volon unuigi siajn fortojn kun tiuj de ĉiuj popoloj, kiuj amas la pacon, por batali kontraŭ la instigantoj de atommilito kaj por daŭra paco en la tuta mondo.

Inter la delegitoj kaj invititoj ĉeestis eminentaj scienculoj, politikaj gvidantoj, inventistoj, artistoj, kamparanoj kaj laboristoj.

Partoprenis ankaŭ eksterlandaj gastoj, inter ili eminenta pacdefendanto Ikuo Oyama el Japanio.

La unua parolanto estis akademiano Stefan Nicolaŭ, kiu prezenis saluton de la Permanenta Komitato por la pacdefendo en nia lando. Li prezentis al la ĉeestintoj listojn kun 11.500.000 da subskriboj de nialandaj civitanoj sub pacrezolucio kaj informis, ke en la lando ekistas jam 23.432 packomitatoj en kiuj koncentriĝas pli ol 260.000 civitanoj el diversaj metioj, de ĉiuj nacioj kaj religiaj kredoj.

- 18 -

Li alvokis, ke ni ĉiuj energie batalu por la venko de la paco, por bari la vojon al la militinstigantoj.

Post li parolis multaj delegitoj kaj ĉiuj montris, ke la du mondmilitoj kaŭzis al la Rumanoj grandajn damaĝojn kaj homperdojn kaj ni ne volas ke nova, ankoraŭ pli terura milito okazu. Mi devas interkompreniĝi kaj solvi ĉiujn malfacilaĵojn. Tion estas la vojo de ĉiu honesta homo, kiu deziras konstrui en paco kaj amas la vivon.

En letero, sendita al la Monda Packonsilantaro en Helsinki oni diras, ke ni, Rumanoj, batalas por sekurigi daŭran pacon en la konscio, ke la pacaj potencoj estas pli fortaj ol la militinstigantoj. Ili nepre devas sekurigi la pacon por la tuta mondo.

Nitta VRINCEANU, MEDIAS – Rumanio

Ilja E R E N B U R G:

POST LA KONFERENCO EN ĜENEVO

Unuafoje post dek jaroj la homoj en ĉiuj landoj kun sama, profunda impresado de sensarĝiĝeco eklegis la ĵurnalojn: laboristo de Leningrado, farmisto de Nebrasko, londona oficisto, studento el Ŝanhajo, pariza pentristo, kuracisto en Kalkuto – ili ĉiuj ĝojis pro la rezulto en Ĝenevo.

Oni ĝojas prave: eĉ se la paco ne estis kreita en Ĝenevo, tamen estis grave batita la intenco al nova mondmilito. La ĉefoj de Kvar Grandaj Potencoj serioze interparolis pri reciproka konfido kaj kompreno. Iu amerika ĵurnalisto al mi diris: “Antaŭ duonjaro apenaŭ revii pri tio estis ebla. Ĉu miraklo...?” Sed la ĝeneva konferenco rezultis kaŭze de venko de konscienca prudento en ĉiuj nacioj. Ĉi „miraklon” klare vidis la pacdefendantoj ne nur antaŭ duonjaro, sed jam en tempo plej maltrankvila en jaro 1950. Memoru la milionojn da diversligvanoj, kiuj super-saĝante la senzorgemon de unuj kaj fatalismon de aliaj – konkordigadis la popolojn, oni rememoru la centmilionojn da homoj, kies volo venigis la politikestrojn al Ĝenevo. En profunda konscio de la popoloj naskiĝis la movado de pacdefendantoj kaj – rapide disvastiĝante – ĝi atingis unuan grandan venkon: Se fakto fariĝis la Ĝeneva konferenco, se malgraŭ la malsameco de esprimitaj opinioj neniu kuraĝis ĉesigi la interdiskuton kaj dezerti al malreputacia pasinteco, do precipe tial, ke ekzistas tutmonde respektinda volo de la popolo.

Historiografo konstato, ke la konferencon en Ĝenevo antaŭ-iris tutmonda packongreso en Helsinki, akcelanta la samajn problemojn, pri kiuj - unu monaton pliposte – diskutis la konferencoj en Ĝenevo: pri malintensigo de armado, malpermeso de atomarmilaro, sendaĝereco en Eŭropo, unuigo de Germanio, kultura kaj ekonomia kunlaboro inter ĉiuj ŝtatoj, pri Tajvano kaj restarigo de legitimaj rajtoj de Ĉino en la organizo de unuigitaj nacioj.

Post Helsinki evidentiĝis, ke aranĝo pri problemoj de sekureco kaj kunlaboro inter ĉiuj eŭropaj ŝtatoj estas neprokrastebla. La ĝeneva konferenco jesis faktan volon de nacioj: dum solvo de malakordo elimini militon kaj komenci traktadon finiĝontan per rezulto, akceptebla ĉiuj partoprenantoj.

Sereniĝas, sed la nuboj ankoraŭ ne estas malaperintaj – la popoloj devas fini la komencitan verkon, atingi firme daŭran pacon por la tuta homaro. Nun dependas de ni ĉiuj, ke la ĝeneva interpaco fariĝu paco definitiva.

Tradukis el „PRAVDA“ (Moskvo) Otakar VYHNAL – Praha

- 19 -

LERNU ARDE MALAMI LA MILITON!

Milito ! Kiom da teruraĵoj kovras tiu ĉi griza vorto? Kaj tamen necesas demandi: ĉu bone konas ĉiu homo la veran vizaĝon de la milito? Ne, multaj homoj nur kredas tion, sed vere nur tiuj konas jam sentis la efikojn devmilito sur propra haŭto. Ĉar tiuj homoj, kiuj observis la okazintaĵojn de milito nur el malproksime, certe ne povis tiel akre vidi, kion signifas milito, kiu estis jam ne milito de militistoj, sed amasmortigado per la plej kruelaj kaj modernaj mortigiloj.

Por ke oni vidu tutklare, kiel oni detruas pacajn hejmojn kaj senkulpajn homajn vivojn mi volas rakonti la sorton de japana familio:

Estis la 6.de aŭgusto 1945, kiam matene aeroplano aperis super la urbo Hiroŝima. En tiu momento subite ekbrilis grandega fulmo kaj la blua ĉielo fariĝis tute blanka. Aŭdiĝis grandega eksplodbruo kaj aperis groteska nubego, kiel giganta monstro, kies centro estis tute ruĝa. Pro la eksplodego ruiniĝis la domoj inter ili la domo de tiu japana familio.

La patro povis elrampi el inter la ruinoj, sed la patrino ne troviĝis. Fine la patro kun la filino trovis ŝin sub granda trabo; kiun ili vane provis formovigi. Tial la patro vokis najbarajn virojn por helpi, sed eĉ komune ili ne sukcesis levi la trabon. Dumtempe jam alproksimiĝis la pli kaj pli vastiĝanta fajrego tiel, ke jam fajreroj falis sur ilin. Tiam la patrino, etendante tra la mallarĝa spaco sian brakon, diris malgajega voĉo al la patro: „Jam nenio helpas, jam malespere, vi ĉiel forkuru!“ La patro respondis: „Kion vi diras? Kiel mi povus foriri sen vi!“ Tion dirinte li denove penis levi la trabon, sed la patrino admonis lin: „Se ankaŭ vi mortus, kio okazus kun niaj postlasitaj gefiloj? Mi petas vin, volu rapide foriri! Pro la infanoj!“ Tiuminute preter pasis oficiro kun ĉirkaŭ dudek soldatoj kaj la patro alparolis ilin: „Mia edzino estas subpremita. Helpu savi ŝin!“ Li surgenuis, tiom petegis, sed vane – ili foriris eĉ sen respondo. Tia jam la fajro ĉirkaŭminacis ili kaj brulfalis lignopecoj. La patro kvankam volis kune morti kun sia edzino, tamen devis pripensi ŝiajn lastajn vortojn: „Pro la infanoj!“ Nevole do li forlasis ŝin kaj fuĝis kun la infanoj, postlasante sian amatan edzinon, la bonan patrinnon, al la terura sorto.

Mallonga, sed korutŝa historio estas ĉi tiu, kies memoro akre kaj tre profunde gravuriĝis en la animon de la patro kaj infanoj.

De tiam pasis jam dek jaroj kaj ni ŝatus esperi, ke neiam ripetiĝos similaj okazintaĵoj ie en la mondo, forrabante tiel kruele niajn amatojn: ĉar kia potenco povas esti surtere, kiu rajtus forpreni la plej grandan valoron, la homan vivon!

Tial mi devas lerni por eterne malami militon kaj en la nuna mondsituacio ni devas manifesti nian firman volon: Ni postulas la pacon! Ni postulas la porpacan utiligon de la atom-energio!

Tion deziras de la pacamantaj popoloj la 247.000 kompatindaj viktimoj de Hiroŝima!

D-ro.B.Szemenyei
ano de la hungara MEM

PRI DU INTERNACIAJ KONGRESOJ

La 40.Universalan kongreson de Esperanto, okazinta en Bologna ĉeestis proks.1.700 gesamideanoj el 35 nacioj. Eĉ Ĉino kaj Japanoj partoprenis. La kongreson salutis reprezentantoj de 15 registaroj en Esp-lingvo kun escepto de unu. La Internacia Somera Universitato prezentis interesajn prelegojn nur per Esperanto. Fondiĝis esp-ista pupo-teatro por la kongresa etularo kaj prezentiĝis la fama lingvisto Blinkenberg de Montevideo kiel dika kavulo. La prezentito tiel akiris la sopiregatan senmortecon, neakireblan per siaj scioj. La belega urbo Bologna honorigis la kongreson diversmaniere kaj multvalore. La prezento „LA REVIZORO“ de Gogol – Zamenhof estis tuta

sukceso pro la senriproĉajn parolado kaj mimiko de la geaktorj, kiuj nur mallonge antaŭe lernis la rolojn. Specialan mencion meritas la reĝio de -s-ino Norma Sacconi, tre ĉarma s-anino, perfekta. Teatraĵo kaj solenaĵoj, kiel ankaŭ la ĉefkunovenoj de UEA okazis en la pompa urba teatro. Strato ricevis la nomon de d-ro.Zamenhof. Okazis viglege aplauditaj „Muzika Vespero“ kun altkvalitaj gekantistoj (Rissone, Brani, Kohler) kaj „Jubilea Rapsodio“ kun internacia teatrejo de la bolognaj fervojistoj. La ĉefepiskopo kardinalo Jakobo LERCARO inaŭguris ŝtonon de nova preĝejo, dediĉita al la patrono de esperantistoj, papo s.Pio X., memorigita per tabulo instalita kun Esperanta teksto.

Kvankam la kongresestraro ne donis al MEM la eblecon sin reprezenti kaj tute prisilentis ĝian ekziston, la forta akcentado de l' Interna Ideo de Esp-o en oficialaj asertoj (D-ro.Privat) evidentigis nian kreskantan influon kaj montriĝis, ke politiko por la paco neniel povas kaj devas esti evitata kaj ke neŭtraleco rilate ĝi ne estas ebla. Post nelonge oni, ankaŭ aprobos nin kaj nian antaŭirintan pravecon.

Ne same bonan impreson faris je mi la kongreso de SAT en Linz, ĉar por SAT Esperanto estas nur teknika perilo por la akcelado de alia idealo. Nefavorigita por la „Interna Ideo“ de Esperanto, SAT ŝajne eĉ ne ŝatas marŝi kun aliaj grupoj de nia movado kaj tial – certe nevole – malhelpas rapidan imponiĝon. Pro tio la kunsido de ĝia pacifista sekcio, kiun pro la dankinda aranĝo de k-do. Hollinger partoprenis estraranoj de MEM kaj APE, ne sukcesis. Oni decidis aranĝi la sekvontan SAT-kongreson en Beograd (Jugosl.)

Kiam ekvidos la mondo sur unu loko la tutan esperantistaron?

Por „honor“ la scienciston pri Esperanto, sinjoron Blinkebner, la 41a universala Esp-kongreso okazos en Kopenhago aŭ eble en Brazilio.

Kiel nova ĝenerala sekretario de Universala Esperanto Asocio estis elektita profesoro J.Lapenna.

D-ro.A.Halbedl
Knittelfeld – Aŭstrio

Profesoro Mieczyslaw SYGNARSKI
ekslektoro de Esperanto en la Jagellona Universitato Krakow
al prof.E.A.BOKAREV en MOSKVO

Vian leteron de la 5/IV.1955 al Esperanto Kooperativo-Sofio, aperigitan en la ĉeĥosl.gazeto „LA PACDEFENNDANTO“, mi legis kun granda intereso kaj eĉ kun vera ĝojo, ĉar ĝis nun via lando estis pene atingebla por ni, esperantistoj, kiuj tiel efika kaj senbrue propagandas en la tuta mondo la pacon inter diversnaciaj – la pacon, kiu ja estas la plej grava fundamento de ĉiuj internaciaj rilatoj.

Laborante pli ol 35 jarojn sur la kampo de internacia lingvo Esperanto, kiel aŭtoro de 4 lernolibroj por tiu lingvo, el kiuj tri ricevis antaŭ kaj post la lasta milito ministerian aprobon, fine kiel ekslektoro de Esperanto en Jagellona Universitato de Krakovo (1946-1952) mi permesas al mi prezenti ĉi tie al vi la aferon ĉi rilatan, kiu certe estos por vi interesa kaj sciinda.

Unu el la plej gravaj okazintaĵoj en la monda Esperanto-movado estis la fakto, ke dum la 8a Generala UNESCA-konferenco en Montevideo estis pritraktata kaj pridiskutata la „Peticio“ koncernanta enkondukon de Esperanto en internaciajn rilatojn, subskribita de 492 organizoj kun 15.454.782 membroj 15.544.780 membroj kaj de preskaŭ unu miliono da individuaj personoj. Inter la lastaj troviĝas unu republika prezidanto, 4 ĉefministroj, 405 membroj de parlamentoj, 5.262 profesoroj, 40.000 instruistoj, 200.000 kuracistoj, juristoj, inĝeneroj ktp. el 76 landoj. Ankaŭ la subskriboj de 1.607 lingvistoj troviĝas sur la Peticio.

Tio estas la plej granda kampanjo iam farita en la kultura historio de la homaro.

La 10.12.1954 la Plena Konferenco de delegitoj el 70 landoj akceptis la meksikian rezolucion, kiu rekonis Esperanto kiel grava faktoro sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo. Same oni rekonis nerefuteblan valoron de Esperanto por la edukado, scienco kaj kulturo.

La decido de UNESCO signifas historian mejloŝtonon en la evoluo kaj progresado de la internacia lingvo. Ili signas komenciĝon de esence nova epoko: tiu de oficiala rekono, kondukanta al la fina

venko: al uzado de la internacia lingvo sur ĉiuj kampoj de la internacia vivo.

En via letero al Bulgario vi petis materialon, kiu povus servi al vi en via poresperanta laboro. Mi sendas al vi la „Alvokon de 20 ĉinaj sciencistoj por Esperanto“, kiun mi iam ricevis kun la broŝuro s.t. „Entomologia Sinica“. Tiun mi speciale kopiis por vi. Ĝia teksto ne estas senerara, sed mi nevolis ĝin korekti kaj ŝanĝi, pro tio ĝi estis transskribita de mi laŭvorte. Estus bone, se vi kontaktus kun la aŭtoro de tiu alvoko, ĉar liaj argumentoj estas tute pravaj.

La 5a festivalo de demokrata junularo, kiu alvenos el ĉiuj anguloj de la mondo al Polio, la lulilo de Esperanto, pruvas plej bone, ke ni vivas nun en la tempo, kiam la kunlaboro sur internacia tereno ne limiĝas nur al rilatoj inter la plej proksimaj najbarlandoj. Hodiaŭ desegniĝas antaŭ ni ĉiam pli klare kaj videble la problemo de la tuta terglobo kun ĉiuj kontinentoj kaj rasoj, kun ĉiuj naciaj lingvoj – do vera „Babel-turo“. En tiaj kondiĉoj ĉiam pli urĝas la afero de unu komuna internacia lingvo, ĉe tio ne natura, sed artefarita kaj pro tio neŭtrala.

La akcepto de unu plej simpla k.plej facile lernebla lingvo, Esperanto, flanke de ĉiuj nacioj – malfermus antaŭ la homaro novajn kaj belajn vojojn de kultura evoluo. Nenion forprenante de la unuopaj nacioj kaj lasante ĉiujn en iliaj naturaj lingvolimoj – Esperanto supren levus multajn naciojn al ilia deca kaj justa pozicio.

Ĉi tion bone komprenis k-do Lenin, kiu verŝajne vidis en la jaro 1912. la 8an Univ.Kongreson de Esperanto en nia urbo Krakov, ĉar esprimis ian sekvantmaniere:

„Estu privilegiita neniŭ nacio kaj neniŭ lingvo Esperanto estas Latino de proletaro kaj mi esperas, ke dank` al ĝia facileco ĉi tiu lingvo helpos al la monda interkompreniĝo“

Samprave esprimis tion *Generalisimo* Stalin en la artikolo s.t. „Kulturo nacia kaj internacia“:

La estonita mondlingvo estos nek angla, nek franca, nek rusa, nek germana, nur iu alia

Ĉi tiu „alia lingvo“, kiu ensorbis en si la radikojn de ĉefaj eŭropaj lingvoj, kiu en la daŭro de sia 66jara ekzisto ĉirkaŭsonis jam preskaŭ la tutan terglobon, kiu laŭ la esperantista himno alvokas „pacajn batalantojn“ ne al „glavo sangon soifanta, sed al harmonia kunlaboro sur la kultura kampo por la feliĉo kaj prospero de ĉiuj nacioj, ĉi tiu lingvo, kiu defendas plej efike kaj firme la mondan pacon – estas sole kaj ekskluzive la lingvo ESPERANTO.

Sur la firmamento de la Esperanto movado aperadas jam signoj, ke ĉi tiu feliĉega periodo rapide al ni proksimiĝas. En la demokratiaj landoj revigliĝis post kelkjara stagnado denove la Esp. movado. Aperas daŭre novaj societoj, en kiuj amasiĝas novaj adeptoj de nia lingvo. En nia lando, laŭ propono de la Asocio de Esp.en Pollando (WARSZAWA, Marszalkowska 81 u.32) la Plenumkomitato de la Jubilea Mickiewiczza Jaro, okaze de la 100jara datreveno de lia morto, decidis reeldoni la faman ĉefverkon „SINJORO TADEO“ en bonega Esp-traduko de A.Grabowski la patro de Esp-o poezio, kaj la verkon de Jastrun pri Mickiewicz – pri tio informis la pola gazetaro kaj radio.

Sciigante vin pri tiuj okazintaĵoj, mi petas vin tre afable, estimata k-do, ke vi bonvolu ankaŭ informi min, kiel prezentiĝas tiu ĉi lingva problemo en via lando, kion vi atingis por nia movado ĉe via alta pozicio en la Instituto de Lingvistiko kaj ĝener.opinias pri tiu lingvo, kiun tiel furioze kontraŭbatalis iam la Hitler-banditoj kaj aliaj.

- 22 -

LA LASTAJ BAROJ EN HUNGARIO

FALIS

La 4an de aŭgusto estis la unua kunveno de la „PACO“-Esperanto-rondo de la 5a Distrikta Kulturhejmo en Budapeŝto. Ĉeestis inter aliaj k-doj. Julio Baghy, Balkányi, Lajos Márton, Aleksandro Németh, M.Kenesei, Jozefo Nagy, la lasta farigis gvidanto de la Rondo. K-dino. Pálma Nagy estas protokolistino k.k-do.Németh, sekretario. Regulaj kunvenoj estos ĉiu ĵaŭde de 17-21 horo.

Post kelkjara silento denove ekfunkciis Esperanto en Hungario tute oficiale. El la redakcio de la vespera partia ĵurnalo „ESTI BUDAPEST“, organo de la urba konsilantaro, venis letero, en kiu ni legas: „PRI LA HUNGARLANDA ESTONTO DE LA ESPERANTO-MOVADO DEVAS LABORI

MEM LA ESPERANTISTOJ, SERĈI LA MALNOVAJN KAJ KOMENCI EDUKI NOVAJN SE DENOVE ESTOS ESPERANTISTA VIVO, - KONTRAŬ KIO NE EKZISTAS LA PRINCIPA MALHELPO – ANKAŬ LA RADIO NE HEZITOS DONI HELPON.

Oni promesis publikigi pli gravajn sciigojn pri la movado. La subskribintino, k-dino. Erzsébet KIS, iama esperantistino, skribis la lastan frazon en Esperanto:

„Mi deziras, ke la malnovaj samideanoj reorganizu la movadon de la esperantistoj.“

La hungaraj gek-doj do devas ekagi! Sed ili urĝe bezonas la bonvolan simpatian kaj helpon de tutmondaj esperantistoj! Kiu povas, sendu gratul-karton, instigojn kaj precipe literaturon: kajerojn, Esp-revuoj, prospektojn, afiŝojn ktp. por pruvi en la Kulturhejmo, kie ankaŭ ekspozicioj estas ebligataj – ke la nova Esp-rondo havas valorajn rilatojn kun la tuta mondo por internacia kultur- kaj pac-laboro.

Ni deziras prezenti ankaŭ lumbildseriojn kaj uzi nelongajn prelegojn. K-dino M. Kenesei ricevis de la 6a Distrikta Packomitato por bona laboro pere de Esperanto specialan premion.

Nia adreso estas:

„PACO“-Esperanto Rondo (Béke Eszperanto Kör) V. ker. Kulturotthon, V. Engels-tér, BUDAPEST, Hungario. Skribu ankaŭ al „Radio – Budapest“!

MI VIDIS KAJ AŬDIS EN OTROKOVICE

Mi travivis 4 belajn tagojn en tiu industria urbo, kie okazis la I. konferenco de ĉeĥoslovakaj esperantistaj pacdefendantoj.

Mi vidis la veran amon por la PACO! Eksterlandaj kaj enlandaj delegitoj entusiasme parolis pri la paco, kiu estas la fundamento por trankvila vivo. Sen paco estus iluzia nia laboro, sen paco furiozus la morto.

Mi vidis amikecon, honoresprimojn de unu al alia, mi vidis reciprokan amon. Ĉiuj partoprenantoj, kvazaŭ unu familio – Svedoj, Aŭstrianoj, Danoj, Francoj kaj niaj ĉeĥoslovakaj delegitoj sincere honoris unuj la aliajn, amike kunparolis, neniam baroj de raso, religio, lingvo – ĉiuj aŭdis nian karan lingvon – vere internacian.

Mi vidis filmon teruran – la detruon de Hiroŝima por atom-bombo. Homoj en flamoj – homoj vive brulantaj; kiom da doloroj, da penoj. Mi notis al mi la historion de naŭjara knabino Jo-Ŝie el Hiroŝima, kiu mortis naŭ jarojn post la atom-bomba eksplodo. Mi petas al vi la finon de tiu tragedio publikitan en japana gazeto:

„La kuracistoj de la hospitalo, kiuj sekciis ŝian korpon:

La interno de ŝiaj ostoj aspektis kvazaŭ abelĉelaro, kaj eĉ la osta medolo estas defektita de la radioaktiveco“

Kiam la bombo eksplodis, tiu knabino estis 8 monata kaj mortis post 9 jaroj – terura estas la efiko de tiu bombo!

Ekkomprenu la seriozan alvokon de Helsinki

„PEREIGI ĈIAN ATOMARMILON“!

Mi aŭdis interesajn prelegojn, sed unu radio travibris ĉiujn: Amu, laboru kaj preĝu por la paco! Nia TUTŜTATA restos ĉe ni en daŭra memoro. La Tutmonda kongreso devos montri al la homaro, ke Esp-o estas nun preta unuigi kaj paciĝi la homaron en grandan familion de eterna paco.

Alfredo MACEK
katolika kanoniko - MIKULOV

MILITBAZOJ EN JAPANIO

Japanio sub la fera kalkanumo de la usona armeo

La 8an de septembro 1951 estis subskribita la Packontrakto en San Francisko. Ĉu Japanio estis plene liberigita de fremda okupado? Tute ne: Kion do signifas la packontrakto de San Francisko?

Ni ja vidas, ke la Pacpakto de S.Francisko estas nenio alia ol unu el la rimedoj de la usonaj imperialistoj, por daŭre subigi Japanion kiel servanton por siaj agresivaj deziroj. Ĝi promesis al la Japanoj nur nominalan sendependecon. Kaj la pacpakto ne estas sola por si mem, sed akompanata de Sekureca Kontrakto, kiu estas pli grava por la usona registaro, ĉar laŭ tiu praktike ebligas rajte establi armeon kaj militbazojn en- kaj ĉirkaŭ Japanio. Jen grava paragrafo de la Sekureca Kontrakto:

„La kondiĉo, ke oni legitimas establodon de usona armeo en- kaj ĉirkaŭ Japanio, estas decidita fare de politika interkonsento de japana kaj usona registaroj.“

Do, plej grava estas la „politika interkonsento“, kvankam la reakcia registaro de Joŝida, kiu estas fidela komizo de usonaj kapitalistoj kun ĉiama intenco vendi la japanan landon kaj popolon al siam astro, tute sekrete faris ĝin. Joŝida eĉ rifuzis klarigon en la parlamento, kie parlamentanoj, reprezentantoj de la popolo informita pri la graveco de tiu Politika Interkonsento, postulus tion.

La 28an de febr.1953 la Politika Interkonsento estis subskribita, kaj jen oni eksciis kia ĝi estas. Unue oni vidis, ke la tempo de la valideco por la Sekureca Kontrakto ne estas limigita. La kontrakto inter Filipinoj kaj Usono validas dum 99 jaroj kaj la Nord-Atlantika Kontrakto validas dum 4 jaroj, sed la valida tempo de la kontrakto inter Japanio kaj Usono estas senlima. Tio signifas, ke Usono kun sia armeo povas okupadi Japanio por eterne, ŝanĝante la nomon de okupanta armeo al rezidenta armeo. Kaj samtempe ankaŭ la terspaco por militbazoj ne estas limigita. Do, militbazoj de la usona armeo en Japanio en la valida tempo kaj terspaco estas tute senlimaj.

Kiel do la japana popolo povus silenti? Jen laboristoj, kamparanoj, intelektuloj kaj studentoj brave batalas kontraŭ la registaro, La ondo de la batalo kontraŭ la pacpakto kaj la Sekureca Kontrakto leviĝas en tuta Japanio kaj ankaŭ hodiaŭ la bataloj daŭras. Ili ne nur daŭras, sed plivastiĝas kaj akriĝas Foje ŝajnis, ke la batalo estas tute subpremita de la reakcia registaro kaj ne povus releviĝi neniam la popolo malvenkos, ĉar profunde en la koroj de Japanoj flamante brulas la malamo kontraŭ la usonaj imperialistoj, kiun estingi neniu kapablos dum Japanio restas makulita de usonaj militbazoj.

Nun en 1955, kiam 2 jaroj pasis post la pacpakto de San Francisko, troviĝas 733 usonaj militbazoj en tiu ĉi lando kaj ties areo estas ĉ.140.560 hekt. nome 0.492 % de la tuta lando. Kaj tiuj militbazoj disŝprucas venenon: la agrikulturo kaj multaj industrioj ricevas grandajn atakojn kaj la ekonomia vivo de la popola subnormiĝas. La morala vivo estas difektita de dekadenca atmosfero, kiu influas gejunuloj eĉ infanoj kaj kripligas iliajn mensojn. Kaj jen malagrablajoj, jen ĉagrenaĵoj svarmas ĉirkaŭ la militbazoj la tuta Japanio veneniĝas.

INFANOJ DE MILITBAZOJ

„Infanoj kreskas en bonaj cirkostanoj“.... tiel oni legas en la unua paragrafo de la Konstitucio Por Infanoj. – Post la militfino ni, Japanoj jam ne povas eĉ miri je ĉio, kio tute diferencas inter nomoj kaj faktoj. Tamen kia sensencaĵo estas la „Konstituci opor Infanoj“! Ni ne povas nin deteni de eksplodo de ridego. Certe nun en Japanio.

(daŭrigota en venonta n-o.)

LA PERANTOJ DE „MEM“

Aŭstralio: Steve BENNET, Flath 3, 62 BRITHON, NSW
Aŭstrio: Franz WAGNER, Unionstr.N-o..10, Zim.12, LINZ (25 ŝil)
Belgio: Fr. DEBAENE, avenue des Naiades, Watermael, BOITS-FORT (50.belg.fr.)
Britio: B.E.P.K.,15 Twisden Road Highgate, Rd.LONDON N.W.5 (6.-angl. ŝil)
Bulgario: Borislav A.VELEV, Stalin 5, GOCE DELĈEV, (10 levoj)
Ĉeĥoslov. Frant.LIĈKA, Březí, č.12, OSTRAVA-Zábřeh (15.- Kĉs)
Danlando: Willy NIELSEN, Kirkegardsvej 54, HJÖRRING (7.-Kr.)
Francio: Claude BLANC, 45 bis,rue Jeane d`Arc, LYON (3) (300 fr.)
Finnlando: Paavo HELKKINEN, Apollkonkatu n-o.4,5, HELSINKI, (300.-M.)
Germanio DDR: Helmut LÖFFLER, Theaterstrasse 1, MITTWEIDA /Sa.(6M)
Germanio BDR: Wilhelm MICHALSKI, Haeselerstr.1, BERLIN-Charlottenburg, D.B.R.
Hungario: Pál BALKANYI, p.adr.MAGYAR MENZETI BANK, Fiókiroda, BUDAPEST 54
(14 Forintoj)
Indonezio: Kho Khwat LIAT, Gang Mandor 7, DJAKARTA.
Islando: Oskar INGMARSON, Langholtsvegi n-o.3, REYKJAVIK.
Italio: Arnaldo OPISSO, Via Assarotti 10, GENOVA 25, (620 liroj)
Japanio: Kansai Ligo de Esperanto Grupoj, Nagacu-hamadoori 2-20, Oojodo-ku, OSAKA (250.-
Jen.)
Polio: Ing.Zdislav GLAJCAR, CIESZYN-poŝtkesto 3, Woj.Stalinogrodzkie, (12.-zloty)
Rumanio: Nita VRÍNCEANU, Piata Reubuplicea 13, MEDIAS.
Svedio: Karl KVIST, Box 109 A. DEJE, (6.-Kr.)
Aliaj landoj sin turnu rekte al la MEM-sekretario: K-do. Anton BALAGUE, Kirchenweg, SANKT
PÖLTEN, Aŭstrio.
Norvegio: Henning NIELSEN, Box 17, ÄLGAARD (9.-Kr.)
Ni serĉas pluajn perantojn en ĉ.landoj.

MONDA ADRESARO DE PACDEFENDANTOJ:

Ĝi aperos en decembro 1955. Ĉiu pacamanto, kiu deziras en la ADRESARO publikigi sian adreson aŭ ev.anoncon, bonvolu ĝin tuj sendi al sia landa MEM-peranto. La perantoj povas sendi siajn adresarojn de la PACO-abonantoj rekte al k-do.Anton BALAGUE, Kirchenweg 12, SANKT PÖLTEN, Aŭstrio.

AL LA REDAKCIOJ DE ESP-GAZETOJ

Ni volonte interŝanĝas nian organon „PACO“ kun via gazeto. Bonvolu sendi la lastan n-on.por interŝ.al nia centra red. K-do. W.GILBERT,44,rue Kléber, FLEURY-les-AÛBRAIS,Loiret/Francio.

„LA PACDEFENDANTO“

Centra organo de ĉeĥoslov.Esperantistaj Pacdefendantoj. Ĝi aperas regule ĉiu monate kun proksimume 10 paĝa interesa enhavo. Raportoj pri la Pacmovado al ĉiuj landoj. Vi povas ĝin aboni, kontraŭ sendo de 15 int.resp.kup.aŭ samvalora literaturo. Ankaŭ vi povas peti viajn ĉeĥoslovakajn korespondantoj, ke tiuj abonpagu ĝin por vi. Mendu ĉe k-do. Rudolf BURDA.

Ni kondolencas

La 10an de aŭgusto 1955 mortis la kara patrin de nia amata kamaradino Marcelle ROBINEAU, redaktoro de „LABORISTA ESPERANTOSTO“ en Parizo. Ŝi bonvolu akcepti niajn plej profundajn kondolenc-dezirojn.

POR VIA KORESPONDADO

mendu pacpropagandan leter-paperon kaj p.k. ĉe k-do.A.BALAGUE, Kirchenweg 12, SANKT PÖLTEN, Aŭstrio.

~

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO, TATRA, n.p. KOPŘIVNICE
Redaktis: K-do.Rudolv BURDA,Palackého nám. č.6, PLZEŇ, ĈEĤOSLOVAKIO
